

1988 novembro
81-a jaro
n-ro 995 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Libroj en enormaj kvantoj

Vi trovos,

ke la "anticiklono" de la Esperanta mondo senteble translokiĝis orienten. (Por ŝpari al vi fosadon en via ekzemplero de *Vetero kaj klimato*, ni tuj memorigu ke temas pri zono de molekula ekscito, alta atmosfera premo, kiu kunportas sunbrilon kaj belajn tagojn.) Jes, varmis en Pekino, la akridoj ĉirpadis, kiam sub la tegmento de la Ĉina Akademio de Sciencoj kolektiĝis la plej granda Esperanta scienca konferenco iam ajn. Ne la plej internacia, eble — sed pasos nur tempeto, tutcerte, ĝis movadaj sciencistoj el la cetera mondo malkovras kaj inspiriĝas mem de la ĉina fenomeno. La emon de kelkaj el ni, skeptiki pri la scienca utilo de Esperanto, disvaporigis la Pekina varmo. Ni esperu, ke per tutmonda kunlaboro, ankaŭ la glacien de l' ekstera dubemado ĝi ekfandos...

Enhavo

- 185 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto: Montriĝas la ĉinaj fortoj
La Ĉina Akademio de Sciencoj intencas fondi internacian universitaton (C. O. Kiselman)
- 186 Scienca apliko: Al Pekino por lerni akupunkturon (Daniela Wermelinger)
Por rekta reprezentiĝo: Kandidatigu Komitatanojn B
- 187 Kalendaro (informoj pri eventoj ĝis la fino de 1988)
- 188 Lingvo-uzo: Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo? La transitiveco de verboj en Esperanto (Bernard Golden)
- 189 Tago de la Esperanta Libro: "Donacetoj subtenas amikecon." (Neil Salvesen, Mark Fettes); Trezorserĉe tra la librokatalogo (Osmo Buller)
- 190 Brokantaj novaĵoj
- 191 Belartaj Konkursoj de UEA 1988 (rezultoj kaj premiitaj poemoj)
Recenzoj: *Abunde kaj redunde* de Josef Rumler, *Kvarfolio* de Jiří Karen, Josef Rumler, Eli Urbanová, Čestmír Vidman (James Cool); *Klaĉejo* de Karolo Piĉ (Kris Long); *Varmas en Romo* de Corrado Tavanti, *Kazinski venas tro malfrue* de Deck Dorval (Donald Harlow); *Murdo en Esperantujo* de Daniel Moirand, *Ŝia lasta poŝtkarto* de Serĝo Elgo (Adrian Hall); *Almanako de bulgaraj esperantistoj* de div. aŭtoroj, *Rozo kaj glavo* de pli ol 50 bulgaraj poetoj (Emilja Lapenna); *Sub la signo de socia muzo. Antologio. Poemoj kaj eseoj.* red. William Auld, Stefan Maul / ilustr. Georgo Kamaĉo (Wojciech Usakiewicz); *Pandemonio: Noveloj, sciencaj artikoloj* de div. aŭtoroj (A. Zagvazdin)
- 198 Nekrologoj: Tibor Sekelj (1912-1988)
- 199 Belartaj Konkursoj de UEA 1989
- 200 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en kaj pri Esperanto)
- 201 Reagoj: Konatiĝi deziras... (Hedwig Van der Velden); La forto de la amikeco (Arnoldo Aguila); Ni mem devas lerni Esperanton! (Rob Keetlaer); Ĉu malsukcesis ĉio alia? (Osmo Buller); Kun aŭ kontraŭ? (Rikardo Ŝulco)
- 202 Loke — Persone — Fake (mallongaj novaĵoj)
- 204 Kongresa komuniko de la 74-a Universala Kongreso en Brajtono
Anoncetoj; Esperanto en radio (interna dorskovrilo)

La kovrilo

Jam en aprilo ni prihimnis la belajn de la UEA-libroservo — sed sen foto. Jen do la foto, kaj ni ŝparos al vi la himnon! Domaĝe, ke nur per la libro-katalogo, *Esperanto* kaj fojfoja kongreso vi povas eksenti la ekziston de tiuj pli ol tri mil titoloj. Pensu pri paĝoj 189-197, kvazaŭ ili estus vojaĝ-prospekto: invito turismi tra niaj bretoj. Kaj ne maltrafu "Laste aperis..."!

Dume ni klopodos havigi al vi la decembran numeron jam ĝustatempe por la Tago de la Esperanta Libro. Ho, kiam oni dediĉos tagon al la (minuskle) esperanta redaktoro?

esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Legata en 105 landoj. Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterkovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 3110 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (1) 316 423; telekso 225931 megy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.


Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

Montriĝas la ĉinaj fortoj

En la 2-a IAKSTE, de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto en Pekino, Ĉinio, partoprenis pli ol 1400 sciencistoj-esperantistoj, inkluzive de pli ol cent el 22 landoj ekster Ĉinio. La vespera programo de la Pekina Televido dis-



"Leviĝanta E-movado en la scienc-teknika kampo de Ĉinio" titoliĝas la dua eseo en la Konferenca Libro. Listo de 264 Esperantaj referaĵoj de ĉinaj sciencistoj en IAKSTE poste pravigas la aserton.

konigis la malfermon de la konferenco, kie parolis gvidantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj membroj de la landa registaro. Fine de la sep tagoj, la konferenco akceptis ok rezoluciojn: interalie, por la fondo de tutĉinia Esperanto-federacio pri scienco kaj tekniko, internacia interliga reto, informcentro, kaj internacia universitato. Entute temas pri unika evento, kiu kredeble fundamentos la evoluon de la scienc-teknika agado en Esperanto dum la venonta jardeko.

Inter la ĉinaj referantoj estis membroj de tutlandaj komisionoj kaj sciencaj burooj, kiuj tuŝis i.a. la temojn "Ekspluato de alta tekniko en Ĉinio", "Sudpolusa esplorado", "Altigi la kapablon kontraŭ tertremo", "Spaca scienco", kaj "Evoluo de novaj kurakteknikoj en Ĉinio". Okazis multaj fruktodonaj renkontiĝoj inter diverslandaj esploristoj: ekzemple, la prelego "LB-membrano – efika molekula arkitekturo" de prof. Jiang Long kondukis al varma interparolo kun japana koloid-kemiisto prof. Takeo Sugano. Matematikisto Christer Kiselman el Svedio, ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Akademio Comenius, esprimis la deziron pli fortigi la kunlaboron inter tiu Akademio, la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kaj la ĉinaj

La Ĉina Akademio de Sciencoj intencas fondi internacian universitaton

Academia Sinica, la Ĉina Akademio de Sciencoj, planas krei internacian universitaton pri scienco kaj tekniko en Pekino (Beijing). La universitato povos ampleksi ĉiujn sciencojn sen limigo, kun emfazo komence pri administrado, ekonomiko kaj teknologio. La plano estas aprobita de la estraro de la Akademio de Sciencoj. Ĝi havas la apogon de la Komisiono pri Scienco kaj Tekniko, kiu estas la plej supera instanco de Ĉinio por tiuj aferoj, ordigita rekte sub la registaro de la lando.

La internacia universitato, kun la nomo *Internacia Esperanta Scienc-teknika Universitato* (mallongigite IESTU), havos Esperanton kiel ununuran labor- kaj stud-lingvon. Esperanto estas studata en multaj universitatoj kaj altlernejoj en Ĉinio. Kiam mi estis tie, mi renkontis multajn studentojn kiuj post okmonata studo parolis bonegan Esperanton kaj povis interparoli tre nuance en tiu ĉi lingvo. Tio akre kontrastas kun la grandaj malfaciloj kiujn havas studentoj kiuj studis la anglan dum ses jaroj. Ilian tre rudimentan anglan mi apenaŭ povis kompreni, kaj ili ankaŭ ne povis kompreni min.

Oni komencos per kursoj pri specialaj temoj por poste paŝon post paŝo ampleksigi la edukon. La universitato almenaŭ komence ne havos proprajn

regulojn pri diplomigo: kunlaboranta universitato kiu sendas instruiston al Pekino donos diplomon aŭ ateston pri eduko laŭ siaj propraj leĝoj kaj reguloj. Profesoroj el Pekino povos ankaŭ instrui (ekster-murajn) kursojn ekster Ĉinio.

Estas emfazinde ke la universitato en sia komenco estos funkciigita malgrandskale. La intereso flanke de ĉinaj studentoj certe estos tre granda, kaj Academia Sinica faros striktan elekton. Tiuj studentoj kiuj estos akceptitaj tial havos kaj tre bonan konon de Esperanto, kaj tre bonajn antaŭkonojn pri la temoj kiujn ili deziras studi. Instrui supozeble estos neordinare interese kaŭze de tio.

Academia Sinica interesiĝas, kiel jam menciite, pri reagoj kaj esprimoj de apogo por siaj planoj fondi la novan IESTU. La iniciato de la akademio estas unika, kaj devas interesi ĉiujn kiuj deziras antaŭenigi internacian kunlaboron pri eduko. Estas grave ke intereso ekzistanta ankaŭ estu formulita kaj ke tiaj opini-esprimoj alvenu al la akademio. Skribaĵoj povas esti senditaj al la adreso Academia Sinica, Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, 52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio.

C. O. Kiselman
(profesoro pri matematiko, Uppsala, Svedio)

sciencistoj-esperantistoj. Polaj reprezentantoj de Universala Medicinista Esperanto-Asocio (UMEA) informis, ke la 8-a Kongreso de UMEA okazos en Ĉino, kaj komentis: "La tre spontana, eĉ iom flaosia entuziasmo de la ĉinaj esperantistoj konvinkis nin, eŭropajn esperantistojn, kiel granda estas la bezono de ĉinoj por eksterlandaj kontaktoj."

Apud la natur-sciencaj kunsidoj okazis kunvenoj de fakgrupo pri ekonomio kaj komerco, kiujn partoprenis ĉ. 500 personoj el ĉ. 100 kompanioj kaj entreprenoj. Jam de ses monatoj laboras tiukampa sekcio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Hungara ekonomikisto Gábor Márkus, kiu prelegis pri "La rolo de teknika evoluo en la hungara ekonomia reformpolitiko", trafe resumis la rezultojn jene: "Oni povis sperti ĉiutage, ke internaciaj, eĉ interkontinentaj sciencaj kaj komercaj kunlaboroj komenciĝis ĉi tie."

Krom la jam menciitaj planoj por novaj iniciatoj en kaj ekster Ĉinio, la konferenco rezoluciis kolekti monon por la eldonado de scienc-teknikaj libroj, kaj kompili kaj eldoni la referaĵaron de la 2-a IAKSTE. La sekva konferenco okazos en Pekino de la 25-a ĝis la 30-a de majo 1990; en decembro 1989 okazos konsulta kunveno pri tekniko-transdono kaj ekonomia kunlaboro per Esperanto en la ĉina urbo Shenzhen.

(bazita sur la raporto de Shen Chenru, vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub ĈAS)

Por rekta reprezentiĝo: Kandidatigu Komitatanojn B

En 1989, kulmine ĉe la 74-a Universala Kongreso en Braĵtono, okazos nova elekto de ĉiuj anoj de la Komitato de UEA – la supera gvidorgano de la Asocio. Laŭ la Statuto, **ok komitatanojn B** (el sume ĉ. 85 komitatanoj) rajtos elekti la individua membraro per rekta perpoŝta voĉdono.

Laŭ la reguloj, po dek individuaj membroj el almenaŭ tri diversaj landoj rajtas proponi nur unu kandidaton el inter la individuaj membroj de UEA. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn. Kompletaj proponoj devas atingi la Centran Oficejon en Roterdamo **antaŭ la 15-a de februaro 1989**.

Por ĉiu komitatano validas la jenaj kondiĉoj: li aŭ ŝi devas esti individua membro de UEA dum la du jaroj antaŭ la elekto kaj resti individua membro tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Jama komitatano estas re-elektebla, kondiĉe ke li aŭ ŝi ne pasigis du oficperiodojn sen ĉeesti almenaŭ unu komitatkunsidon.


Se la nombro de validaj kandidatoj ne estos pli ol ok, ili ĉiuj estos konsiderataj kiel elektitaj. Se la kandidatoj estos pli multaj, voĉdonilo estos sendita al ĉiuj individuaj membroj en aprilo 1989.

Uzu vian demokratian rajton!

SCIENCA APLIKO

Al Pekino por lerni akupunkturon

Anonceto publikigita en la revuo *Esperanto* altiris mian atenton, ĉar mi interesiĝas kaj okupiĝas pri la medicina mondo. Mi do skribis al la Akademio "Sinica" de Pekino, kaj baldaŭ ricevis oficialan invitilon de la Akademio pri Scienco kaj Tekniko de Ĉinio. Mia amikino Anne-Isabelle Laplagne, kamaradino el sama liceo "Alfred Kastler" (Nobel-premiito pri fiziko kaj honora prezidanto de la Kultura Esperanto-Centro "Florival", de la orient-franca urbo Guebwiller), estis ankaŭ interesita, kaj ni planis iri ambaŭ. Unue, ni plifirmigis nian Esperantan scion dum paskaj ferioj ĉe Kultura Esperantista Centro en La Chaux-de-Fonds (Svisio), sub la efika trejnado de profesoro Gacond, direktoro de la Centro. Ni iris ankaŭ dokumentiĝi en la franca nacia Esperanto-muzeo de Gray, kie instiganto de la muzeo, s-ano Junier, afable disponigis al ni la medicinajn dokumentojn de la biblioteko. Kaj ni senpacience atendis la tagon de la forflugo.



Alveno al Pekino

Post dudekhora flugo, ekde Parizo kun haltoj en Belgrado, Dubaï kaj Calcutta, Ĉinio troviĝis sub niaj okuloj. Pekino estas formita de rektaj avenuoj, interligitaj per vojoj, kiujn eŭropanoj taksus neireblaj pro la truoj; sed nia taksia ŝoforo ne estis ĝenita, kaj baldaŭ kondukis nin al la universitata kampo de la Akademio Sinica. Beijing estis multenombraj homoj malrapide irantaj, dum bruis akridoj en aero peza de varmo kaj humideco.

Ni miris pri la nove eltrovita mondo de la ĉinoj, kaj same la enlandanoj scivoleme rigardis nin. Senegalaj studentoj pruntedonis al ni biciklojn, kaj ni iradis kiel la pekinanoj, vizitante la urbon, la komercan straton Wang Fu Gin, kaj marŝante sur la placo Tien An Men. Ni ankaŭ vizitis la Grandan Muron, la Someran Palacon, kaj apudajn urbojn kaj vizitindaĵojn, ne forgesante aĉeti silkajn kaj ledajn vestaĵojn.

Piki la punkton

La akupunktura kurso okazis en lernoĉambro de la Akademio. Ni estis dudeko: geĉinoj, polinoj, sovetiano, japanino, senegalano, aŭstralianino, germano, norvegino, kaj ni du francinoj. Kvankam la tuto estis ege interesa kaj profitoplena por ni, ni bedaŭris la malalt-nivelan lingvoscion Esperantan de niaj profesoroj, kaj la ĝeneralan ne-bonan organizon. Tamen ni volas esperi, kiel oni tion promesis al ni, ke en venontaj jaroj la kursoj estos pli bone prezentataj en internacia lingvo. Kvin profesoroj-doktoroj instruis al ni la teorion kaj praktikon de akupunkturo kaj mokso. Ankaŭ ni havis la ŝancon "piki la punktojn" sur ni mem, aŭ sur niaj kolegoj; ni eĉ sanigis polinon kaj la senegalanon. Ni iris ankaŭ en hospitalon, kie ni estis



La internacia akupunktura klaso: ĉu nur la unua el multaj?

akceptitaj de la fama profesoro Wang Xuetai, prezidanto de Centro de Esplorado pri Akupunkturo, Mokso kaj Masago de Ĉinio. Ni renkontis ankaŭ la hospitalan prezidanton de la Akademio Sinica, d-ro Tang Xianghui, kaj d-ron Chen Jiying de la Kemia Instituto kaj specialisto pri la tradicia ĉina medicino.

Ni vidis kiel oni preskaŭ faras miraklojn sur kripluloj kaj lamuloj, kaj flegas plej diversajn malsanojn. La kvar-semajna staĝo finiĝis per ekzameno kaj atribuo de diplomo (pri kiu ni ĉiuj ege fieras), kaj ankaŭ per bankedo kun delikataj ĉinaj manĝoj.

Ambasadorino de la franca biskvitfabrikado

La dua Internacia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko, kun partopreno de pli ol 1200 sciencistoj el dudeko da landoj, postsekvis la staĝon. Ĉar mia patro estas biskvitfabrikanto, mi kunportis dokumentaron pri tiu arto, kaj okaze de komerca kaj ekonomia kunveno mi prezentis la dosieron al interesitoj. S-ro Zuo Caiyuan el provinco Hunan akceptis la dokumentojn kaj promesis esplori ĉe la registaraj instancoj ĉu estos eble konstrui biskvit-fabrikon en Ĉinio. Mankas al Ĉinio devizoj, kaj oni proponis pagi per vestaĵoj aŭ aliaj varoj. Mi nun restas en rilato kun la ĉinaj amikoj, kaj mia patro same agas ĉe Franca Unuiĝo de Biskvitfabrikantoj por plu esplori la oportunecon eble krei biskvituzinon en Hunan-provinco.

Ĝis revido!

Anne-Isabelle kaj mi jam planas reiri al Ĉinio, tiu ensorĉa lando. Mi esperas post kelkaj jaroj plu lernadi akupunkturon en ĉina hospitalo, kaj jam povas uzi kun efiko kaj sukceso sur parencoj aŭ amikoj kiuj ne timas la malgrandajn nadlojn, kaj kiuj miregas pri rapida kaj foje mirakla rezulto. Pro tio, mi estas dankema al niaj ĉinaj amikoj.

Daniela Aminda Wermelinger (Francio)

Pliaj detaloj pri la subaj aranĝoj estas ofte, sed ne ĉiam, haveblaj ankaŭ de la Centra Oficejo (tel. +31 10 436 10 44 / Mark Fettes)

daŭre "Esperantotur", str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo "Express", Pk. 567, H-1395 Budapeŝt, Hungario

novembro

16-19: **Paderborna Novembra Renkontiĝo**, Paderborn, FR Germanio (Kleinenberger Weg 16b, Paderborn)
 17-20: **10-a Konferenco pri Internacia Lingva Komunikado**, Lodzo, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP UL, ul. Narutowicza 41, PL-90-925 Łódź)
 27-04: **Esperanto '88: Internacia Konferenco por la Evoluo de Esperanto en Iberameriko**, Havano, Kubo (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Roterdamo, Nederlando)
 28-30: **Novembra Junulara Festivalo**, montaro Ozren apud Tuzla, Jugoslavio (NJF, Esperanto-junularo, R. Vokića 2, Dom mladih, YU-75000 Tuzla)

decembro

02-04: **32-a Kultura Semajnfino**, Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)
 05-10: **Internacia Seminario "Sojle al la dua jarcento"**, Ahrenshoop, Germana DR (Esperanto-Asocio, Otto-Nuschke-Str. 1, DDR-1080 Berlin; temo "Esperanto – lingvo kaj parolantaro: Kion konservi, kion ŝanĝi?")
 27-03: **32-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo**, Traben-Trarbach, FRG (GEJ, Eifelstr. 9, D-5300 Bonn 1; temo "religioj kaj ideologioj en Eŭropo")
 27-03: **Silvestra Esperanto-Renkonto**, montaro, Pollando (Studenta Esperanto-Klubo, RO ZSP, ul. Fredry 7, PL-60-967 Poznań)
 27-03: **Renkontiĝo de juna kaj meza generacioj de esperantistoj**, Groznjan (Istrio), Jugoslavio (IKS, Amruŝeva Groznjan 5/I, YU-41000 Zagreb; temo "Ekkonu la E-generacion de la 60-aj jaroj")
 27-06: **Internaciaj Vintro-Ferioj**, Dusznike (Sudetoj), Pollando (Eki Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster, FR Germanio)
 28-01: **Jarfina Esperantista Kunloĝado**, Zagarolo, Italio (Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo)

AVANTAĜO DUMVIVA!

En la oktobra numero (p. 183) ni prezentis la novan kotiztabelon kaj invitis al **frua remembriĝo**, atentigante ke oni ne plu aŭtomate ricevos la martan numeron de la revuo sen aboni ĝustatempe por 1989.

Kiam altiĝas kotizoj, fariĝas trafa horo decidiĝi pri dumviva membreco. Vi povas akiri tion per pago de 25-oblo de la kotizo MA, kaj **ĝis la 31-a de decembro validas por tiu kalkulo la tabelo 1988** (vidu *Esperanto* 1987/p. 187). Jam tuj vi ekprofitos el via decido, neniam plu necesos pagi kotizon. Jam tuj UEA gajnos el via subteno, ĉar pli fortos la nukleo de niaj dumvivaj subtenantoj.

Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo?

La transitiveco de verboj en Esperanto

Estas sciate, ke en etnaj lingvoj ekzistas gramatikaj apartaĵoj, kiuj estas tiel komplikaj kaj arbitraj, ke ili ne estas lerneblaj de homoj, kiuj ne estas denaskaj parolantoj de la lingvo. Neniu gramatikisto, neniu metodologo pri fremdlingva pedagogio, kapablas formuli didaktike praktikajn regulojn, ĉar daŭre prezentiĝas esceptoj. Bona ekzemplo estas la uzo de prepozicioj en la angla lingvo. Ne ekzistas reguloj por klarigi ĉiujn lingvajn situaciojn. Malgraŭ granda fortostreĉo kaj longa tempo de studado, eraroj svarmas ne nur en la parola lingvo de alilingvuloj sed ankaŭ en publikigitaj tekstoj. La misuzo de nur unu eta prepozicio sufiĉas por malkaŝi fremdulon, kiu ne cent-procente primajstras la anglan.

Ĉu ankaŭ en Esperanto, la sola planlingvo, kiu montriĝas sukcesa internacia komunikilo, ekzistas malfacilaj gramatikaĵoj, kies instruebleco estas senespera? Jes! Unu el tiaj gramatikaĵoj estas la transitiveco de verboj.

PRI KIO TEMAS?

La sekvaj kvin frazoj, ĉerpitaj el diversaj numeroj de *Informilo pri la instrua laboro*, fakperiodaĵo dediĉita al la metodologio de instruado de Esperanto, ilustras eraran uzon de verboj.

1. "la ajn prokrasto kaŭzas problemojn kaj rezultas la malkreskon de la lernemo de la kursano."
2. "Mi startis lernejan kampanjon kun la celo krei bazon de poresperanta agado de iuj mezlernejoj."
3. "Premion gajnas tiu, kiu ĉesas la raporton plej akurate."
4. "Multaj lernolibroj de fremda lingvo komencas per dialogoj."
5. "La didaktikaj lingvaj ludoj diferenciĝas disde la ordinaraj amuzaj ludoj . . ."

La ĝustaj verbformoj estas la sekvaj: 1. rezultigas; 2. startigis; 3. ĉesigas; 4. komenciĝas; 5. diferencas. Tiujn ĉi erarojn faris homoj, kiuj *instruas* Esperanton, kaj eblas trovi simile misuzitajn verbformojn en la verkoj de la t.n. bonaj aŭtoroj!

Antaŭ ok jardekoj Émile Boirac en artikolo publikigita en *La Revuo*, kritikis la trouzon de la sufiksoj *-ig* kaj *-iĝ*, ĉar la uzantoj de Esperanto ne scias la transitivecon de verboj. Supozeble oni povas informiĝi pri la transitiveco pri verboj en vortaroj, sed kelkfoje ne estas akordo inter leksikografoj. En *Plena vortaro* (PV, 1934) verboj estas signitaj per la mallongigoj *tr*, *ntr* kaj *x*, signifantaj "transitiva", "netransitiva" kaj "uzebla ambaŭmaniere" respektive. Tiel estis la situacio ĝis 1970, kiam estis publikigita *Plena ilustrita vortaro* (PIV). En ĝi la *x*-oj estis forigitaj, kaj la ĉefredaktoro, Gaston Waringhien, klarigis, ke lia opinio "pli bone estas analizi ĉe ĉiu verbo, ĉu unu senco donas transitivan, alia netransitivan karakteron al la radikoj." Tiel, en la artikoloj pri kelkaj verboj, oni trovas ke ili estas

uzeblaj jen transitive, jen netransitive, kaj oni devas lerni tiujn signifojn kaj uzojn.

Ankoraŭ unu problemo estiĝas pro influo de la gepatra lingvo de esperantistoj. Malsama funkciado de samsignifaj verboj okazigas erarojn en la uzo de kelkaj Esperantaj verboj, kiuj havas alian transitivecon. Detala pritrakto de tiu ĉi trajto de verboj en Esperanto sekvas ĉi-sube.

1. Manko de markilo por transitiveco

La malfacilaĵo rilate transitivecon de verboj en Esperanto estas la rezulto de la "enkonstruita" naturo de tiu trajto, kiu estas parto de la semantiko, ne la morfologio. Tio signifas, ke oni povas scii la transitivecon de baza verbo (sen sufikso), nur se oni scias la precizan signifon: la formo mem ne indikas tion. En Esperanto ne ekzistas markilo de transitiveco simila al la markiloj de tenso *-as*, *-is* kaj *-os*. La uzo de la sufiksoj *-ig* kaj *-iĝ* estas ebla, nur se oni *scias antaŭe* la transitivecon de la verbo. Tio klarigas la tendencon de kelkaj esperantistoj trouzi tiujn sufiksojn; ili skribas *rezultiĝi* kaj *evoluiĝi* kiam *rezulti* kaj *evolui* sufiĉas.

2. Verboj arbitre klasifitaj

La transitiveco de pluraj verboj en Esperanto estas arbitre decidita. Kiel unu el miaj korespondantoj esprimis tion, la transitiveco estas atribuita kvazaŭ per ĵeto de ludkubo. Tio estas evidenta en la kazo de Esperantaj verboj, kies ekvivalentoj en aliaj lingvoj ne havas la saman transitivecon. Ekzemple, hungareparolantaj esperantistoj misuzas *enui* (ntr.), ĉar la hungara verbo *megun* estas transitiva kaj sekvigas rektan objekton: "li enuas pri/pro la vivo" tradukita hungaren estas *megunta az életem*, laŭvorte "li enuas la vivon".

3. Universala malfacilaĵo

La malfacila uzado de transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto ne dependas de la gepatra lingvo de lernantoj kaj uzantoj, nek de la nivelo de instruado, kiun ili ricevis. Eraroj troviĝas en la parola kaj skriba lingvo de komencaj lernantoj, iliaj instruantoj kaj ankaŭ membroj de la Akademio de Esperanto! Ne gravas, ĉu temas pri parolantoj de hindeŭropaj lingvoj aŭ aziaj lingvoj kiel la ĉina kaj japana. Makulitaj per eraroj estas tekstoj en lokaj klubbultenoj, prestiĝaj internaciaj periodaĵoj kiel *Heroldo de Esperanto*, *Montato* kaj *Fonto* kaj — plej hontinde — ankaŭ en didaktikaj publikigaĵoj. Nek aŭtoroj, nek redaktantoj, nek korektantoj de presprovaĵoj kapablas elsarki ĉiujn ĉi-specajn erarojn.

4. Fiasko de lingvoinstrua metodologio

Eĉ la plej evoluintaj metodoj de instruado de fremdaj lingvoj ne sukcesis forigi aŭ mildigi la malfacilecon, kiu trafas ĉiujn lernantojn. Studentoj en la Universitato de Budapeŝto, kiuj lernas Esperanton kadre de studoj de aplika lingvistiko, faras la samajn erarojn kiel ordinaruloj, kiuj neniam frekventis universitaton. Malgraŭ la altgrada

instruado, kiun ili ricevas, ili ne kapablas superi la influon de la gepatra lingvo, aŭ ili simple *malĝuste divenas* la transitivecon de kelkaj verboj.

5. Kaŝiteco de la malfacilaĵo

Neniu el la dek ses reguloj de la Fundamenta gramatiko pritraktas transitivecon. Cetere, la temo estas ĝenerale ignorata en lernolibroj kaj kursoj, kaj ne ĉiuj vortarkompilintoj indikas la transitivecon de verboj en siaj verkoj. Du esceptoj estas M. C. Butler en sia Esperanta-angla vortaro (1967) kaj J. C. Wells en sia dudirekta angla kaj Esperanta vortaro (1969). Tiu ĉi aŭtoro skribas, ke verba transitiveco estas “eble la plej malfacila punkto de la gramatiko de Esperanto por angleparolantoj.” Sed li kaj M. C. Butler malsamopiniis pri grava afero. Laŭ Wells Esperantaj verboj havas specifan transitivecon, dum Butler asertas, ke “ne estas regulo, ke certaj verboj devas aŭ devas ne sekvigi rektan objekton.” Sufiĉas unu ekzemplo por reliefigi la kaoson en la Esperanta leksikografio — aŭ ĉu temas pri la lingvo mem? La angla verbo *to yearn* (sopiri) estas netransitiva, kaj sekvas ĝin la prepozicio *for* aŭ *after*. En la vortaro de Wells la transitiveco de *sopiri* ne estas signita. Male, Butler indikas, ke estas eble diri “sopiri ion (tr.)” aŭ “sopiri al, je, por, pri io (ntr.)”. Sen objekto *sopiri* estas uzebla absolute. En *Plena vortaro* sekvas post *sopiri* la litero *x*, signifanta, ke la verbo estas uzebla jen transitive jen netransitive. Kontraŭe, en *Plena ilustrita vortaro*, *sopiri* estas netransitiva!

Hereza propono

En letero al japana esperantisto, kiu plendis pri la kaosa malobeo de transitiveco ĉe verboj, usona esperantologo skribis jene: “Mi . . . kelkfoje diras, ke en kunteksto ni devus ne konsideri erara misuzon de tiu eco de verbo. Ekzemple, vortaroj proklamas, ke *bruli* estas netransitiva, kaj Esperantistoj opinias, ke estas eraro diri ‘Mi brulis la lignon’. Sed estas nenia ebla konfuzo ĉi tie. Oni eĉ povus uzi la principon de neceso kaj sufiĉo por pravigi ellason de *-ig* (bruligis). Mi suspektis, . . . ke transitiveco ne povas esti universala propraĵo de verbo.” Ĉu tiu vidpunkto povas fariĝi ĝenerale akceptita “regulo”?

Bernard Golden (Hungario)

Postnoto de la redaktoro: La legantoj eble ŝatos elprovi ĉe si la jenajn testfrazojn, por juĝi pri eblaj limoj al tia lingva libero. Ne rigardu en PIV ĝis post via respondo.

1. (a) La analizo en Plena Analiza Gramatiko komplikas.
(b) Kalocsay kaj Waringhien komplikas sian analizon.
2. (a) Ĉi tiu teksto kompostis per malnova maŝino.
(b) Oni kompostis la libron en Antverpeno.
3. (a) Li komplementis pro ŝiaj afablaj vortoj.
(b) Ŝi komplementis lin pro la bona parolado.
4. (a) La listo kompletis post aldono de ŝia nomo.
(b) Ne eblas kompleti la liston ĝis revenas la respondiloj.
5. (a) Mi komplezos al vi ankaŭ en ĉi tiu afero.
(b) Ĉu vi ne volas komplezi nin per tiu servo?

Laŭ PIV, ĝustaj estas 1(b), 2(b), 3(b), 4(a), kaj 5(a); la aliaj estas eraraj. Laŭ mia lingvosento, almenaŭ 1(a) kaj 5(b) estas akcepteblaj, kaj eventuale ankaŭ 4(b). Demando por la esperantistoj: Kiel influas la sentata gramatika karaktero de la radikoj? Ĉu adjektivaj radikoj pli liberas ol substantivaj kaj verbaj?

15 DECEMBRO · TAGO DE LA ESPERANTA LIBRO

“Donacetoj subtenas amikecon.” (*Proverbaro Esperanta*)

Vi verŝajne memoras, kiel grava al vi estis la unua vortaro aŭ legolibro Esperanta. Libro ĉe la ĝusta homo estas potenca ilo. Aparte en nia transnacia movado, kiu kreas novan komunikan ordon per tutmonda interpersona reto, librodonado estas deklaro, programo, konscia ago de kreo kaj rezisto.

Ĉe la Libroservo de UEA, kelkaj regule mendas proprakoste ekspedon de libroj al amikoj en aliaj landoj. Vi tiel atentigas la kuraĝigon de la movado en landoj kie libroj malfacile akireblas — plimulto de la landoj en la mondo. Per librodonado oni povas ankaŭ danki aŭ simple saluti feste kaj sezone. Ĉiukaze temas pri esprimo de amikeco kaj solidareco.

Kaj pensu ne nur al la ricevanto. Libro vendoj kuraĝigas krome eldonistojn kaj aŭtorojn, kiuj kune kreas gravan eron de la Esperanta kulturo. Se en nia literaturo vi malkovris iun el la klaroskuro de renomo, aŭ trafis nepran furoraĵon, dividu tiun plezuron per donaco: vi samtempe spronas la aperon de pli da tiaj verkoj. (Persona letero al la aŭtoro, la tradukinto aŭ la eldonisto krome helpus.)

Ja al ĉio ĉi oni dediĉas la tagon de Zamenhof, la 15-an de decembro. Tial ni memorigas ĉi-numere pri la riĉa abundo de nun haveblaj verkoj, al kio UEA kontribuis per pli ol nura obolo, kaj aliaj per siaj trezoroj. La Tago de la Libro tamen ne sufiĉe oftas por krei kutimon kiu estu pli monata ol jara. Indas plue noti, ke la Katalogo konsistas ne nur el libroj, kaj ke ankaŭ ekzemple kasedo estas bonvena donaco. Por la kondiĉoj de la Libroservo, vidu sub la rubriko “Laste aperis” sur p. 200. Ekspluatu nin por plenumi viajn mendojn kaj peri viajn donacojn.

Sur la sekvaj paĝoj aperas unu pruvo, ke ne necesas amase elspezi en tiu agado, kaj pluraj pruvoj, ke la lastatempa originala verkaro en Esperanto jam memstare proponas ion por ĉies gusto. Iuj verkoj pli erudicias, iuj verkoj pli distras; la recenzoj same. Bonŝancon por la trovo de propra plaĉaĵo. Ni jam atendas vian mendon!

Neil Salvesen/Mark Fettes

Trezorserĉe tra la librokatalogo

Unu el la plej belaj okupoj estas vadi tra la paĝoj de la librokatalogo de UEA. Sed . . . ĉiufoje oni veas kiel aprile Mark Fettes ĉi-revue: valoraj libroj ŝimas sur la bretoj. . . . Honto! mi diras, ĉar dekoj da brilaj verkoj de pli ol duona jarcento atendas, ke ilin oni foraĉetu! Se entute eblas tia komerca verbo, kiam la prezoj tiel bagatelas, ke ili apenaŭ ekzistas!

Se nun por vi *La konscienco riproĉas* (rakonto de A. Strindberg, 1928; 4,20 gld.), ne hezitu preni vian parton de tiuj malnovaj sed ĉiam valoraj libroj! Kelkajn el la perloj mi nun aparte proponas.

Eble mi komprenas, ke *Juneca ardo* (1936; 3,60 gld.) kaj *Vartejoj* (1938; 3,60 gld.), originalaj romanoj de N. Bartelmes, plu serĉas la lastajn aĉetontojn. Ili ne estas majstraĵoj. Sed ili varme rakontas pri la vivo de prolet-infanoj tiutempaj kaj devas legi ilin ĉiu, kiu serioze interesiĝas pri la Esperanta romano. Sed mi tute ne komprenas, kial alia originalaĵo el 1924, *Pro Iŝtar* de H. A. Luyken, ne jam estas monopolaĵo de brokantejoj. Nuraj 9,00 gld. estas malmulte por tia fascine streĉa kaj belstila aventur-romano. Des pli, ke ĝia fizika vesto estas preskaŭ luksa.

Batalo pri la domo Heikkilä de J. Linnankoski (1919; 1,80 gld.) al ni finnoj ruĝigas la vangojn, ĉar ĝi estas la plej moderna suoma verko Esperante eldonita... sed ne legu ĝin antaŭ enlitigo, ĉar okazas en ĝi io horora! Tamen la traduko de V. Setälä estas por li honora, same kiel tiu de H. Hall en *La botistoj* de A. Kivi (1919; 3,60 gld.), al finnoj la komedio plej kor-proksima. Kaj de la norvega majstro de dramo, H. Ibsen, vi povas plu aĉeti *Reaperantoj* (1925) por... 0,60 gld., kaj la belan teatraĵon *Pasko* (1935) de la svedo Strindberg por 3,30 gld.

Se ankoraŭ halti ĉe teatraĵoj, ni nepre ne preterlasu *Natan la saĝulo* de G. Lessing, en traduko de K. Minor (1923; 1,80 gld.), ĉar tiu verko, pasia pledo por toleremo, ne perdas sian aktualecon. (Kiel etan biskviton frandu la originalan komedieton de Minor, *Pro Dio! Ne esperantiston!* el 1924 je 0,60 gld.) Kaj ni ne maltrafu verkon de alia granda germano: *Atta Troll* de Heine, "satiro de malbonaj poetoj kaj falsaj demokratoj", trad. Zanoni (1925; 1,50 gld.). Ĉi lasta verko fakte apartenas al poezio, sub kiu rubriko eldonaĵoj antaŭmilitaj laŭdinde malmultas. Tamen ni pluku tie *Poemo de l' plugisto* (1930; 3,00 gld.) de la bulgara proleta poeto Ĥ. Ĥrima.

Sole la nomo de la tradukintoj devus vin altiri al la Kabe-a interpreto de *Bona sinjorino* de E. Orzeszko (1924; 0,60 gld.) kaj al tiu de E. Wüster pri *La kantistino* de W. Hauff (1921; 1,50 gld.), historioj tragikaj. Kaj se la kataloga misinformo pri "iom lama fino" en *La cikoni-kalifo* de M. Babits (1929; 2,70 gld.) fortimigis vin, sciu, ke temas pri romano sorĉe mirinda! Mirinda estas ankaŭ

la traduko el la plumo de la frue mortinta hungara talento Karlo Bodó. La freŝon de lia lingvo vi ĝuas ankaŭ en la novelaro *La norda vento* de Fr. Karinthy (1926; 2,10 gld.). Ili du aperis en la papere kaj aspekte ĉarma serio *Biblioteko tutmonda* de Rudolf Mosse.

Ĉe kuniĝoj de bona verkisto kaj kvalita tradukisto ni devas noti ankaŭ *Noveloj* de H. Sienkiewicz/Lidja Zamenhof (1925; 2,70 gld.), la satirajn *Orientaj fabeloj* de V. Doroŝeviĉ/N. Hohlov (1924; 2,70 gld.) kaj *Elektitaj noveloj* de I. S. Turgenjev/A. Mexin, ĉi-lastaj i.a. kun la neforgeseble kortuŝa *Mumu* (1923; 2,70 gld.).

Ĝis nun ni restis nur ĉe eŭropaj verkistoj, ĉar tiutempe ili ja pli ol nun superregis nian beletron. Tamen, la eldonejo Hirt & Sohn, kiu ŝajnas superregi ĉi mian kolekton,

en 1924 eldonis la romanon *Deklaracio* (3,90 gld.) de la japano Ariŝima, en traduko de T. Tooguu. Kaj samjare eliris ĉe Hirt ankaŭ *El la skizlibro* (2,70 gld.) de W. Irving, la unua usona verkisto monde famiĝinta. Tiu ĉi lasta estas interesa ankaŭ pro sia tradukinto: H. L. Elvin, nun membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Same ĉe Hirt aperigis ankaŭ usonano E. Payson, kiu krome verkis originale, sian tradukon de la romano de kirliĝaj eventoj, *La palaco de danĝero* (pri Madame La Pompadour) de M. Wagnalls (1926; 5,70 gld.).

Nomo, kiun la mondo maljuste forgesis, estas tiu de la belgo L. Bergiers. Apenaŭ 20-jara li kreis majstran tradukon de du noveloj de sia samlandano G. Eekhoud, *Servokapabla!* / *Marcus Tybout* (1927; 2,70 gld.). Precipe en la unua el ili, la forte kontraŭarmeas *Servokapabla!*, oni jam sentas simptomojn de lingvaj piroteknikaĵoj, plene fajrontaj

en la originala novelaro de Bergiers, *Ili* (1930). Ĝin serĉu brokanteje!

Kion aldoni pri la malabunda faka literaturo? Sole tion, ke dum restas neelĉerpita la klasika *La vendreda klubo* (1921; 7,20 gld.) kun valoraj artikoloj pri pedagogio de laboro, Leibnitz, kolorteorio de Ostwald ktp, mi rikanas pri plia eldonado de scienca kaj faka literaturo.

Mi jam finas. Sed ankoraŭ io: Antaŭ 20 jaroj *Petro Schlemihl* (1922; 2,70 gld.) de Chamisso, en traduko de Wüster, fariĝis la unua beletra verko kiun mi legis en Esperanto. Pramalnova recenzo de V. Setälä tiom entuziasmigis min, ke mi tuj per ekspresa letero ĝin mendis ĉe UEA por ne malfrui. Aĥ, bluokula gimnaziano...

Osmo Buller (Finnlando)

BROKANTAJ NOVAĴOJ

Kvankam granda ekspedo al Kubo antaŭ kelkaj semajnoj forprenis preskaŭ la tutan stokon el nia brokantejo, al la kongresa libroservo amase alvenis "novaj" brokantaj libroj. Alvenis ankaŭ kelkaj kolektoj de revuoj, jene:

Scienca revuo, 1964-77, nebinditaj

La praktiko, 1948-70, nebinditaj

Esperanto triumfonta / *Heroldo de Esperanto* ĝis 1965 (mankas nur la nederlandaj numeroj de *Esperanto triumfonta*)

Heroldo de Esperanto, 1948-84, nebinditaj

Espero katolika, 1907-10, 1914, 1920-21, binditaj

Nederlanda katoliko, 1-a jaro kompleta, 2-a jaro sen n-roj 3/4, nebindita

Esperanto, diversaj jarkolektoj inter 1911-38, binditaj, apartaj numeroj el la jaroj 1907/09/10, 1933-37

Esperanto internacia, 1939-46 + *Esperanto*, 1947-59 (mankas 1948), binditaj

La pirato, el la jaroj 1934-35, numeroj 11, 18, 20-25, nebinditaj

Ni volonte sendus pli detalan informon; pri la prezo, bonvolu mem fari oferton. Ni multe preferas, ke kaj la libroj kaj la revuoj troviĝu sur viaj bretoj je via utiligo. Kiam ni ricevas tiujn kolektojn, ni zorge kontrolas, ĉu Biblioteko Hodler jam ĉion posedas (lastatempe ni akiris per viaj donacoj kelkajn gravaĵojn kiuj mankis). Same ni donas prioritaton al tiuj kiuj celas kompletigi fakon de sia biblioteko.

Dankon kaj al liverantoj kaj al klientoj!

Teorio for de la praktiko

Abunde kaj redunde. Josef Rumler. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986. 32 p. 21 cm. Prezo: 3,00 gld.

Kvarfolio. Jiří Karen, Josef Rumler, Eli Urbanová, Ĉestmír Vidman. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1985. 32 p. 21 cm. Prezo: 3,00 gld.

La du broŝuraĵoj, maldikaj literaturaj suplementoj al la revuo *Paco*, aspektas modeste; tamen, pro malgrandaj preslitteroj kaj ofte duoblaj kolumnoj, ili liveras ampleksajn tekstojn. El ili gravas pleje la eseo "Abunde kaj redunde" de la poeto Josef Rumler, kromtitolite "Koncepto pri la diversaj stiloj kaj ĝia apliko al la Esperanta leksiko".

Du ĉefaj temoj okupas Rumler. Unue, li tezas, ke Esperanton konsistigas tri sublingvoj aŭ stiloj: la komun- uza, la faka, kaj la arta. Certe ne novas la koncepto pri funkcie diferencaj stiloj; en Esperanto, tamen, oni tro malofte atentigas pri ili. Tiu stil-distingado ebligas al Rumler pli fundan diskuton pri la Esperanta leksiko.

Laŭ li, la Zamenhofa Esperanto estas "rudimenta", potenciala kanvaso de leksiko, "nura stilo kaj ne lingvo". Hodiaŭ tiu Zamenhofa stilo taŭgas nur por la komun- uza funkcio; la faka (ĉefe scienca) kaj arta stiloj ege lamas pro tro malriĉa vortprovizo.

Tiuj malfortoj kondukas al la dua ĉeftemo, la manko de sinonimoj. Rumler uzas devizojn por montri kiun lek- sikon bezonas ĉiu funkcia stilo. La komun- uza stilo akcep- tas vortojn nur "necese kaj sufiĉe". La faka stilo riĉiĝas "koncize kaj precize". La skemisma generado de fak- terminoj per kunmetaĵoj produktas nur plursignifajn kaj malkonkre- tajn formojn; feliĉe la 15-a regulo de la Funda-

mento permesas alproprigon de la ekzaktaj, internaci- normaj terminoj.

Pleje anemias en Esperanto la arta stilo. Kompare al etnaj kulturlingvoj, laŭ Rumler, Esperanto restas malriĉa, inercia, stagna. Por krei stilon riĉan je nuancoj, Esperanto devas en sian artan stilon enkonduki neologismojn "abunde kaj redunde". Rumler ĉerpos ilin de ĉie, de *omnaloke*: Ido-vortaroj, retroderivaĵoj (*malgraŭ*, do ankaŭ *graŭ*), naciaj fontlingvoj de Zamenhofa Esperanto, sed nun ankaŭ de orientaj lingvoj. Inspiron por tiu sinonimriĉa Esperanto Rumler certe trovis en *La litomiŝla tombejo* de Piĉ, kies neologismojn li transprenas.

Rumler foje konvinkas pri la bezono de pli matura arta lingvo; sed oni rajtas dubi pri lia solvo, la senĝena enkon- duko de plej abundaj sinonimoj el plej diversaj fontoj. Kvankam lia abundo kaj redundo ankoraŭ ne fariĝis sen- senca *miŝmaŝo*, oni emas kredi, ke la poemoj de Rumler (cetere ankaŭ la romano de Piĉ) valoras ne *graŭ* la neo- logismoj, sed malgraŭ ili. Konsternige, ke la du aŭtoroj sentas tiel urĝan bezonon de sinonimoj ĝuste por kon- junkcioj kaj prepozicioj. Ĉu vere *ak*, *plus* kaj *ed*, apud la jama *kaj*, iel ajn riĉigas la lingvon? Ĉu krom *kiel* utilas *estiel* kaj *kom*? Ĉu la latinaj adverboj *nam*, *enim*, *olim*, kaj *aŭtem* iel rimedas la povrecon de la Esperanta konver- sacia stilo? Certe devas ekzisti aliaj semantikaj kampoj, kie la manko de sinonimoj estus pli perceptebla. Cetere, tiujn fremdaspektajn vortetojn povas pravigi eĉ ne la naturalismo: kiu etna lingvo atestas tian abundon de redundaĵoj?

Sed kiel pri la poezio? La titolo de la dua libreto, *Kvarfolio: versoj de pragaj poetoj-Esperantistoj*, certe invitas komparon al *Kvaropo*, centra verko de la skota skolo. Nu, la poemoj de la kvar pragaj poetoj ege diversas. La mallongaj poemoj de Jiří Karen (tradukis Jiří Kořínek) prezentas melankoliajn rememoraĵojn el militaj travivaĵoj, en kiuj la perforto kaj morto ne sukcesas sufoki lirikan voĉon. La dek delikataj "Japanaj motivoj"

Belartaj Konkursoj de UEA 1988

POEZIO: Unua premio: **Mauro Nervi** (Italio) pro *En mansardo*; Dua premio: **Mauro Nervi** pro *Ŝi diris, ke...*; Tria premio: **István Ertl** (Hungario) pro *El la libroj de forgeso kaj komenco*. Honora mencio: **István Ertl** pro *Raporto de Tezeo pri la lastaj horoj de la iama juda kvartalo* kaj **Baldur Ragnarsson** (Islando) pro *Lingvoj kaj Baroj*. Partoprenis 79 verkoj de 33 aŭtoroj el 16 landoj.

PROZO: Unua premio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *La ĉokolada biskvito*; Dua premio: **Tibor Sekelj** (Jugoslavio) pro *Facilanima virino*; Tria premio: **Meva Maron** (Britio) pro *Rubusoj*. Honora mencio: **István Ertl** pro *La deka logo* kaj **Sten Johansson** pro *Renkontiĝo kun boaco*. Partoprenis 37 verkoj de 22 aŭtoroj el 11 landoj.

TEATRAĴO: Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: ne aljuĝita; Tria premio: **Emilja Lapenna** (Jugo- slavio) pro *Lanĉo*. Honora mencio: **Eduard V. Tvarožek** (Ĉeĥoslovakio) pro *Kesto da venenaj ser- pentoj* kaj *Je la dua post noktomezo*. Partoprenis 7 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: **Bernard Golden** (Hungario) pro *Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj plan- lingvoj*. Partoprenis 7 verkoj de 6 aŭtoroj el 4 landoj. KANTO: Premio An-okin pri Kanto: **Antoaneta Ata- nasova** (Bulgario, teksto) kaj **Serafima Djutĉin** (Bulgario, muziko) pro *Epitafo* kaj *La sciuro*. Parto- prenis 18 kantoj de 9 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 6 landoj.

FOTOGRAFIO: Unua premio: **Gerrit Kalkman** (Nederlando) pro la fotoserio *Esperanto transportas sciencon-teknikon*; Dua premio: **Bertil Danielsson** (Svedio).

NOVA TALENTO: **Kris Ungar** (Britio) pro la poemoj *Preludo kaj fugo*, *Februaro* kaj *Aŭtuna korkanto*. Ŝia nomo estos gravurita sur la pokalo "Henry Harabagiu", konservata en la Centra Oficejo de UEA.

INFANLIBRO DE LA JARO 1987: *La fratoj Leon- koro* de Astrid Lindgren, tradukita kaj eldonita de **Kerstin Rohdin** (Svedio). Partoprenis 7 libroj de 7 eldonejoj el 6 landoj.

Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA
V. Benczik, prezidanto; O. Buller, sekretario

de Ĉestmír Vidman inspiriĝas en have, foje eĉ forme de japanaj kulturaĵoj. Ambaŭ poetoj preferas mallongajn, senrimajn versojn kun pli-malpli "komunuza" stilo, sed enhavoj tute malsimilas.

"Lasta ĉevalo" de Rumler mem estas tre longa poemo; pli ol intrigo aŭ esprimo de iu animstato, ĝin animas preskaŭ fizika plezuro en la baroke virtuoza elŝprucigado de vortoj. La ada ripetigo de vortoj kaj silaboj kvazaŭ esploras la eblecon elserĉi signifon aŭ eble kapti ĝin per reto de interplektitaj sonoj.

La plej konata poeto de *Kvarfolio*, Eli Urbanová, proponas ciklon da animportretoj. Ŝi preferas fiksfarmajn strofojn, regulan metrikon, kaj rimojn. Solide kaj konkrete ankras ŝiaj poemoj en la ĉiutaga vivo. Ili bildigas virinon senesperan post la morto de ŝia amanto, kaj dum ŝi suferas, ŝi rigardas sin suferi, ofte kun sufiĉe da distanco por ironio kaj eĉ humuro. La plej facile ĝuindaj poemoj de la kolekto, ili neniom cedas al la aliaj en profundo. Male.

Sed devas jam evidenti, ke inter ĉi tiuj kvar poetoj komunas nek lingvo nek estetiko. Nek la tradukaĵoj nek la japaneskoj uzas neologismojn. En eseeto, Urbanová ĝentile laŭdas la utilon de "piĉismoj" por tradukoj; en siaj originaloj ŝi ŝajne ne sentas bezonon. Se entute ekzistas iu praga skolo, temas pri grupo de tre diversaj verkistoj, kiuj sen komuna estetika programo tamen sin respektas kaj kuraĝigas reciproke. Certe la eseo "Abunde kaj redunde" ne servos kiel manifestacio por iu nova poezia skolo. Ĝi tamen meritas pro la diskutoj pri stiloj kaj sinonimoj, dum la poezia verko de Rumler montras grandan talenton, kiu brilas eĉ tra la kapricaj neologismoj.

James F. Cool (Usono)

Post la litomiŝlaj kulisoj

Klaĉejo. Karolo Piĉ. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 188 p. 21 cm. Prezo: 56,10 gld.

Ne rezignu je la sepa linio ("Ĉu ĉiu nam sciu, ke ni estas umumitaj?"). Nek post kelkaj paĝoj ĉar "seks-perversa kaĉo". Tamen... Mi legis ĝis la fino, mirante ke senĉese sekvas pluaj trafoj – kaj mi tamen tre hezitas senplue laŭdi.

La litomiŝla tombejo ŝajnis izolita ĉefverko de aŭtoro kiu restos unulibra kiel Proust; tiel mi recenzis ĝin en *Literatura Foiro* (LF) 72. Impreso kiel eble plej erara, ĉar jam ekzistis tuta trilogio, kiun finas nun *Klaĉejo*. La stilkapricoj/stilnovismoj ŝajnis tiam senĝenaj. Unue ĉar Piĉ verkis iam en mirinde simpla Esperanto, do liaj konkludoj estas nepre konsiderindaj. Due ĉar iuj proponoj fakte konvinkis. Kaj trie ĉar oni sentis la romanon ĝuebla malgraŭ la kapricoj – ili ŝajnis nur ŝaŭmo.

Intertempe venis tamen fanfaronoj de la Iltisa skolo kaj la "praga artiliteratura". La Literatura Manifesto '87 de la unua estis dokumento tro malklera por meriti detalan rebaton; la praga skolo publikigis malpli alireble, en broŝuroj suplementaj al ĉefaj numeroj de *Paco*, sed ricevis pli atentan kritikon jam de N. Rossi (LF105), B. Golden (*Literatura skatolo* 16) kaj G. Silfer (LF111). [Vidu ankaŭ la ĉi-kunan recenzon. – red.]

La pragaj tezoj ŝajnas esti jenaj: ke necesas multaj sinonimoj, abunde da (ekzemple al ekzistanta konfuzo inter *mortema* kaj *mortonta* aldoni *mortala* kun *ambaŭ* signifoj, do nutri konfuzon anstataŭ pli subtile distingi aŭ provizi vortojn ne tro specifajn); kaj ke literatura stilo

Poezio: Unua Premio

En mansardo


Dediĉe al R.

Tagoj aŭroris malfacile ekster la vitraĵ'
— blanke glacia lumo, sojle de l' mateno —; vi rigardis
silente mian manon sur kuseno, dum ekstere
homoj klaĉadis, motoro ekfunkciis,
kaj kamion' forglitis sur la streta vojo
trans la fenestro, klakis la hejtilo, per muzik'
zumadis aparat' en dom' najbara; sub la traboj
tegmentaj vi silentis, kaj nur vintro, vintro regis.

Kaj nun, ho amikino, ĉio delonge foras,
ĉi aŭtunon enkrozas disvele mia spleno.
Disciplino alvokas, sed por mi, naskiĝinta sub Kankro,
vi scias, gravas lunoj kaj opaloj; mia mano
iam atingos vin trans la vortico, kaj denove
jen ĉio, mansardo kaj kuseno... Al la nordo
komenca, kvazaŭ por plenum' de l' teoremo,
harmonie kaj dolĉe revenos la kompas.

Mauro Nervi (Italio)

*Samkiel la pelatoj de
la hispana pentristo
Juan Genoves, el kiu
katastrofo fuĝas
la Ertla tribo?*



Poezio: Tria Premio

El la libroj de forgeso kaj komenco (fragmento)

(...) Ekmigri urĝis. Minace malpliigis la provianto,
bestoj saŭronaskontaj sin paŝtis en la grenejo.
Matene denove aperis la nubokolosoj
kaj, venĝante iamajn ofendojn kontraŭ la ĉielo,
venenis deknaŭ senkulpajn novnaskitojn.
La tribo, post ol ŝtonumi la sentaŭgan ŝamanon,
decidis forlasi siajn kavernojn humidajn.

postulas uzi diversajn vortojn pli-malpli samsignife por eviti malelegantajn ripetojn.

Nu, tiaj manifestoj estas ja nur ŝaŭmo super roko, nome Piĉ en ambaŭ kazoj. Kiom kulpas Piĉ pri siaj epigonoj? En glosoj li plej ofte penas precizigi distingojn (inter ekzemple *nam/ĉar/nome/enim*) dum la praganoj facilanime glosas *segun: laŭ*. Aliflanke la postparolo al *La litomiŝla* asertas, ke “la franca stilistiko, kaj simile ankaŭ la ĉeĥa, esperanta . . . ripetadon ne toleras. Laŭ ili, en bona prozo, unu vorto laŭeble ne aperu dufoje sinsekve sur la sama paĝo.” Laŭ mi lingvo diktas stileblecojn



pli ol inverse; kaj efektive sur la unuaj paĝoj de *La litomiŝla* la praktiko de Piĉ montras tiun iom arkaikan stilrimedon ne unika (“Ekzistas homoj, kiujn tombejoj fortimigas. Tion vi ne komprenas. Vin tombejoj ĉiam logis. Tombejoj. Kaj kriptoj.” Ktp.).

La pragaj epigonoj transprenis nur la ŝaŭmon. Kvan-kam ili *tezas* pri aparta literatura stilo (“Neniu intencas enkonduki artliteraturajn novismojn en konversacian esperanton”), ili apartigas nur la lingvon de *teoriumado*, dum la poezia lingvo restas ĉiutaga, eĉ komencanteca en la senĉesaj adoj de “Matena melkado” aŭ “Lasta ĉevalo”.

Komenciĝis pilgrima migrado, en libroj
kanonaj kaj apokrifaj mitiĝonta.
Survoje obstaklis obusoj, kelkaj
solecaj transvivantoj — ĉi-lastaj nelonge — ;
necesis eviti la insidajn kadavrojn de metropoloj,
kaj fine nepris klabi kaj manĝi la kadukiĝintojn.
(La dezerto ne planas nek pardonas.)

Post jaro (aŭ pli, ĉar la tagojn kalkuli
scipovis nur la ŝamano ekzekutita)
ili atingis la maron cindran kaj strange trankvilan.
“Thalatta!” — ekkriis la ĉefo kaj ordonis
ĉarpenti flosojn el traboj kaj lianoj —
lianoj verme prosperis tiujare.

Aŭroro griza aŭguris vojon peripetian
por la fragila flosaro —

ĈI-LOKE EĈ LA SINOPTIKOJ MALKONSENTAS

kaj tiel perdiĝis plejparte la gento preferita,
lasante por la posteuloj
krom kelkaj trabsplitoj relikviĝintaj
la miton taŭgan por fondi
la historion de l’ epoko
postciviliza.

István Ertl (Hungario)

Do fakte la praganoj ne konstruas elitajn poeziajn lingvon, sed aldonas latine kaj angle spicitan *translingvon* por nebula teoriumado. Nu, pli bone tiel ol inverse! La poezia lingvo restu sana kaj modela . . . Piĉ, male, konscias mankojn (por romanisto) ĝuste en parola lingvo. La latin-eska vortprovizo de *La litomiŝla* kongruis kun la etoso de la piarista gimnazio kaj latinaj mesoj; ĉu la samaj vortoj trafos en la buŝojn, trafos el la buŝoj de du klaĉemulinoj? Sed Esperanton oni ja ne parolas perfekte! Nenio mirinda, ke fremdlingvaj vortoj spicas konversacion — *jen* ĝuste la malalta stilo! Kial do ne ĉeĥaj vortoj en *Klaĉejo*? Eble ĉar latinaj estas pli vaste konataj, kaj Piĉ celas proponi *modelon* en kiu dua lingvo rolas pli realisme?

Post tiaj antaŭklaĉoj — kion do pri la romano mem? Ĉu vi memoras la piscinan rankoncerton en *La litomiŝla*, ĉap. 19? Kaj ke “la lignotabuloj estas sekaj, disstariĝintaj kaj fendozaj, kaj ili havas belajn rondajn truojn post elfalintaj nodoj. Viroj postaradas ĉe la truoj kaj observas virinojn, kiuj senvestiĝas ene”? *Klaĉejo* estas tute tia postkulisa subteksto. Kaj la verkisto, kiu “. . . ŝatas promenadi. Matene! Kiam la stratoj de Litomiŝlo ankoraŭ dormeme vakas kaj malplenas . . .”, postkulise aspektas jene: “Do Jana havis knabon. Jes! Mi memoras. Ian puberulon. Ian duonmaturulon kiel ŝi. Li sufiĉis al ŝi, dum ŝi posedis neniun. . . . Kiam ŝi ekkonis la verkiston, ŝi irigis la puberulon al diablo. Kion pri li? Li sciis nur tion! Kaj eĉ tion li sciis sol fuŝe. Do adiaŭ! Kaj ĝis la nerevido!”

Sed la libro temas ĉefe pri kolbasaj, *kolbasudaj*, eĉ gulaŝaj sidvangoj (*vanginoj* — la parola lingvo preferas manipuli per afiksoj!), kiuj “havas ĉiujn kolorojn de la spektro. Ili bluas, ruĝas, violeas, flavas, brunas, verdas . . .” “Sur [la] blanka karno ruĝis kaj pufis tri ŝvelaj strioj, tri freŝaj, intumeskaj kolbasoj, kiuj antaŭ kvin horoj ankoraŭ ne estis tie. Ĝis nun ili brule flagris. Motakino glitigis sur ili la manon. Facile. Leĝere. Kelkfoje ŝi karese glatumis ilin. Poste ŝi sendis al ili ardan amrigardon . . .” Rimarku, ke Piĉ spicas delikate, ne diboĉas per novismoj kiel la praganoj. Pli karakterizaj ol latinaj *aŭtem* kaj *us-kve* sonas esprimoj laŭ la spirito de la Proverbaro kaj judaj idiomoj: “Tintoj fintoj! Fabeloj por alies oreloj! Tia dekfoje diluita konjako ebriigos neniun en la barako!”

La libron finas apoteozo. En 1819 la poeto Keats [kic] skribis en letero, ke “eĉ plej abomeninda disputo surstrate elmontras belajn energiojn; eĉ la plej banala homo dum kverelo gracias. Eble niaj rezonadoj same sonas al iu supera — eraraj, sed belegaj — jen l’ esenco de poezio.” (Ĉu prilingvaj klaĉbataloj plej mirinde montras la energion de Esperanto?!) La apoteozo estas jena: “Kaj la horo estas ĉarma kaj glora, praa kaj ĝojoza kaj plena de ia espero, kiel se ĝi estus pentekosta vigilio.” Novakino ĵus rakontis pri la ulo, kiu ne nur fikis ŝin, sed krome ŝin eĉ amis. “Parpluvis . . . La atmosfero puriĝis . . . Venos belaj tagoj, nun . . . La matenoj estos rosudaj . . . La vesperoj odoros paduse kaj lilie . . .” “La suno subiras. Grande kaj rozee. Ĝiaj radioj lumumas la urbon. Vesperigaŝ.” Kaj — iel en la sunsubiro violeas kaj bluas kolbasuda pugo: ĉu vi konsentos?

Oni sentas, ke necesis tia kompletigo de la iom tro narcisa *Litomiŝla tombejo*. Jen la *tutan* Litomiŝlon Piĉ amas! *Kaj* la tutan lingvon! Erst nun ni vidas Litomiŝlon *plene* glora.

Kris Long (Britio)

[illegible]

Varmas en Romo. Corrado Tavanti. Ĝenevo: Kooperativo de Literatura Foiro, 1986. 185 p. 21 cm. Prezo: 34,80 gld.
Kazinski venas tro malfrue. Deck Dorval. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 175 p. 21 cm. Prezo: 23,40 gld.

Jen du libroj, kiuj unuavide estas de la sama speco, sed legate montriĝas havi tute malsamajn spicojn. La unua estas rapidmova “nigra farso”, lingve tre ordinara, kaj la dua estas tre detala detektivromano de pli-malpli ordinara speco, plena je lingvaj eksperimentaĵoj Piĉeskaj. Esperanto mem ludas rolon en ambaŭ libroj: ŝlosilan en la unua, nur fonan en la dua.

En *Varmas en Romo*, polickomisaro Piero De Angelis varbas esperantiston-ĵurnaliston Danilo Cerri por malkovri la veron malantaŭ serio da bombatencoj kontraŭ instancoj de la malagasa registaro en Italio (poste Svislando). Brulanta demando: ĉu vere kulpas ia amasmovada “Armeo Liberiga” esperantista, aŭ ĉu temas pri grandega blufado fare de kelkaj malmultaj neesperantistoj aŭ pseŭdoesperantistoj? Pri tio, Cerri ne ĉiam konsentas kun la aŭtoritatuloj. En *Kazinski venas tro malfrue* ĉefinspektoro Ksaverio Kant (el *Jaĥto veturas for – kaj veturigas la morton*) frontas la kazon de ĉantaĝisto murdita en apudantverpena vilaĝo. Kompreneble, multas la suspektenduloj; sed ĉiu el ili ŝajne havas nefrakaseblan alibion, enklude la titolpersonon Ivo Kazinski, kiu intencis murdi la malbenendan Krimp-on, sed al la murdbangalo venis . . . tro malfrue, post la efektivigo de la murdo. Kant devas elfosi la identon de la murdinto, poste pruvi ĝin – tasko ege, eble tro, malfacila.


En ambaŭ romanoj la ĉefrolantoj estas tre bone ellaboritaj. Danilo Cerri drinkemas, pliparte pro sia esperantisteco, kiu ne tute akordas kun lia ĵurnalista scio pri la vera mondo. De Angelis estas frustriginta diplomatigemulo, kiu turnis sin al la polico kiel metodo flankatingi la diplomatan servon; li devas ĝeniĝi pri la ĵaluzema edzino kaj la misfarema filo Idi (nomita laŭ Idi Amin) kiu volas fariĝi bombteroristo. Ksavero Kant estas metodisma detektivo, iom malpli ŝatinda ol li estis (laŭ mia memoro) en la pli frua romano, kaj, kiel ĉiuj policanoj, tute ne kontenta pri la stato de la prikrima juro en sia lando. La entuziasman d-ron Gulopez de *Jaĥto* anstataŭas la entuziasma juna, ideoriĉa policdetektivo Oktavo Dutri, kiu parolas kun Kant en Esperanto. Kiel jurmediciniston oni disponas la grandaĝan, grumbleman, demandeman kaj lerte ruzan d-ron Grum – kaj ties hepaton.

Malpli egale skizitaj estas la fonoj de la romanoj. El *Varmas* neitalo povas ekscii multon pri la italoj, aparte pri iliaj sintenoj al strikoj, popmuziko, trafiko, vetero, manĝaĵoj, amo, politike tendencaj gazetoj, ktp . . . ne minimume, al si mem ("Neniu komprenos iam nian popolon," diras jur-ekonomik-esperant-rub-isto Angelo Tripioni sur p. 77). La Belgio de *Kazinski* estas malpli bone difinita: la scenejon povus egale facile prezenti la Londono de John Dickson Carr aŭ la Losanĝeleso de Erle Stanley Gardner. Nur pri la tiea jura sistemo oni povas lerni ion per la romano.

Aparte allogas en *Varmas* la komedia (farsa) etoso, kiu preskaŭ tute mankas en *Kazinski*. Kelkaj amuzaj eventoj okazas ekster la scenejo (mi mem ŝatus legi transskribon de la pridemandado fare de la svisa polico kontraŭ la konataj verkistoj Henri Beupierre kaj Johán Valano, dum kiu la policianoj – sur paĝo 89 – “atingis absolute nenion, krom prelegetojn pri la valoro de la Internacia Lingvo”); sed egale ridigaj, kaj cetere surscenejaj, estis la savo de la bopatro de De Angelis, la atako kontraŭ la rubaĵkamiono, la plendoj de la antiterorista polico pri la kosto de murdita manekenpupo, kaj la disfalemo de la lito de Vanda Colombo. Sola provo pri komedio en *Kazinski* estas la raporto pri la vizito de Dutri al la hejmo/laborejo de la voluptulino Gilda Ronse (p. 147-149).

Neniu el la du libroj havas vere kontentigan finon. La fortoj malantaŭ Armeo Liberiga neniam montras sin, sed ekzistas indikoj ke ili estas sufiĉe gravaj; kaj la vera(j) murdinto(j) de Krimp neniam frontos tribunalon.

Kio? · Kiam? · Kial? · Kie? · Kiun? · Kiom? · Kies? · Kian?



Cu vi legemas

Kini? Kiel?

Meritas diri kelkajn vortojn pri la lingvaĵoj. En *Varmas* mankas vera glosaro, kvankam Tavanti uzas tiun vorton por kapi tri paĝojn da notoj pri italaĵoj (enklude du idiotismojn, kiujn li laŭvorte tradukis Esperanten), kaj liaj neologismoj ĝenerale pli-malpli 60-80-jare “novas”; eĉ la insultvorton *sbiro*, dufoje uzitan de Jolanda De Bonis, kaj la roman polic-oficon *kvestoro* mi trovis en PIV!

Male, *Kazinski* abundas je neologismoj, grandparte Piĉaj. Kelkaj eble valoras (mi mem, kiel vi vidas, uzas *kludi*, kiu ne estas simpla sinonimo de *fermi*; kaj la tute nova novismo *nipite* preskaŭ pravigas sian ekziston en la tria linio de paĝo 148); sed multaj ne utilas, aparte en populara romano, kie ili delogas la atenton de la leganto, kaj kelkaj malutilas – la prefiksa uzado de *po-* kaj *pro-*, ekzemple, tute ne akordas kun ties prepoziciaj signifoj. Verdire, “Deck Dorval” mem jam malkonfesis sian propran senperan kulpon pri tiuj “malfeliĉaj ekcentrikaĵoj” (el letero citita en *Literatura foiro* 110, p. 24); sed ili certe makulas libron kiu, kvankam ne mondklasa literaturaĵo, almenaŭ estus multe pli ĝuinda sen ili. Kiel anglalingvano, mi volas plendeti ankaŭ pri la ĉiama uzado de *returni* anstataŭ *reveni*, *reiri*.

Resume: *Kazinski* certe ne malatentindas, sed *Varmas* ja plezuras je legado.

Donald J. Harlow (Usono)

[illegible]

***esperanto* 1988 novembro / 195**

Impona amaseco, kun iom da talento

Almanako de bulgaraj esperantistoj. Prozo kaj poezio, originala kaj tradukita. Div. aŭtoroj. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 141 p. 23 cm. Prezo: 13,80 gld.


Rozo kaj glavo. Antologio de originalaj poemoj de pli ol 50 bulgaraj poetoj. Sofio: "Sofia-pres", 1987. 337 p. 23 cm. Prezo: 15,00 gld.

Bulgaroj dum sia 80-jara Esperanta historio ĉiam dediĉas gravan atenton al la poezia kreado. En la lastaj jardekoj tion pruvas multaj aranĝoj kaj festivaloj organizitaj por prezenti kreaĵojn de bulgaraj verkistoj. Ne mirige ke tiu popolo kapablis lastatempe publikigi eĉ du librojn de la propraj verkistoj. En la *Almanako de bulgaraj esperantistoj* (AB) sian prozon, poezion kaj tradukaĵojn konigas al la internacia leganta publiko 30 aŭtoroj; en la pure poezia antologio *Rozo kaj glavo* (RG), eĉ 63. Certe bulgaraj esperantistoj povas fieri pri tiu amaseco, sed la historio firmigos ĉu tio pravigas la aserton de Georgi Mihalkov pri ekzisto de "Bulgara skolo". Ankaŭ tiu verkinto de la enkonduko al *Rozo kaj glavo* subiĝis al infekta obsedo proklami "skolo" ĉiun nacian grupon de verkistoj aŭ aron de ili ĉirkaŭ iu eldonejo.

La temoj en ambaŭ libroj estas diversaj. De fora historio "Kanto de sklavo el Tracio" (Antoaneta Atanasova, AB); tra turka regado kaj la septembra ribelo de 1923 "Kantoj de l' ribelo" (Dimitro Zlatarski, RG);

ĝis antaŭnelonge aktuala partipolitika temaro esprimita per versoj kiaj "vi, Breĵnev, – mem giganto!" (Asen Grigorov, AB) kaj internaciaj okazaĵoj kunlige al tiu politika direkto: Vjetnamio, Angela Davis, "pentagonanoj". La paco estas ofta inspiro, ne sen politika nuanco, apud multaj bulgaraj esperantistaj okazaĵoj, kiuj ricevis sian poezian reeĥon:

Kaj la membraro bulgara
de Esperanto-Asocio
al neŭtraleco erara
kontraŭstariĝis konscie
(Canko Murgin, RG).



Kelkaj el la desegnaĵoj de Georgo Kamaço en Sub la signo de socia muzo.

Socia muzo ne favoris la esperantismon

Sub la signo de socia muzo. Antologio. Poemoj kaj eseoj. Redaktis William Auld kaj Stefan Maul. Ilustris Georgo Kamaço. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 123 p. 21 cm. Prezo: 24,00 gld.

Antologioj ĉiam pensinstige kundensigas diversajn, kvankam iusence parencajn tekstojn. Atentindas do jam la ideo mem, kolekti faskon da soci-temaj poemoj esperantlingvaj, des pli ke la magazino *Monato* sukcesis fini la entreprenon per eldonigo de libro. La volumon konsistigas sume 113 eroj – inter kiuj ankaŭ 6 eseoj – origine verkitaj en la jaroj 1914-1984. Ĉiujn oni siatempe (re)presis en *Monato*.

La socia muzo plej ofte patronas temerojn tradiciajn: klasa aŭ grupa ekspluatado, milito kaj paco, malriĉo, justo, unueco de la homaro. La nombro de la nuntempaj problemoj ne limigas sin tamen al ĉi tiuj kaj kontente mi vidis, ke la redaktoroj traktis la titolon iom vaste, inkludante poemojn pri ekzemple amaskomunikado, kuracistaj dilemoj, samseksemo, senŝtateco. Kiel ekzistaĵoj ankaŭ ĉi tiuj fenomenoj indas rimarkadon. Rilate la laŭteman elekton mirigis min du aferoj. Unue, mankas poemoj verkitaj post la dua mondmilito kaj soci-aspekte ligiĝantaj kun

Esperanto (kontraste al la pli fruaj) – kvazaŭ Esperanto estus tute perdinta la socian dimension. Ĉu tio konfirmas la margenecon de la rolo, kiun ludas nun la esperantistaro en la vivo de la mondo? Eĉ pli strange, ke mi trovis nur unu poemon koneksan al ekologio, problemo tiel graviĝinta lastatempe. Ĉu oni ne spegulis ĝin en la esperantlingva poezio? Ŝajnas, ke eblus serĉi, ekzemple ĉe K. Long aŭ J. Karen.

Tiaspeca antologio gravas por mi antaŭ ĉio kiel aro da interplektitaj, poezie esprimitaj opinioj. Tial dum la prezentado de la libro mi antaŭigis la temojn al la aŭtoroj. Cetere la nomaron oni povas pridiskuti senfine, do pli bone rezigni pri tio. Trudiĝas tamen unu escepto – forstanta E. de Kock, ĉe kiu politikaj kaj sociaj akcentoj aperas tiel ofte, kiel supozeble ĉe neniuj aliaj esperantlingva poeto.

Prisocia verkado ofte okazas per grupaj kategorioj kaj klaraj opozicioj: burĝoj/proletoj, fi-militemaj politikistoj/pacama popolo, riĉuloj/mizeruloj. Analizcelaj simpligoj taŭgaj kelkfoje por publicistiko aŭ sciencumado ne ĉiam ĝustas por poeziado. Miaopinie, poeto devus esti homo kiu trovas per lingvilo novon en malnovo, malkovras preteratentitaĵojn. Sekve, al multaj eroj en la antologio – interesaj histori-sence – mi nevolonte almetus estetikan mezurilon. Inter la aŭtoroj okupiĝantaj pri temoj "tradicie sociaj" pleje allogas min tiuj, kiuj ne cedas al slogan-alvokoj, do ekzemple paradoksanta

Nigra Maro, Rodopoj, Rila-montaro, pluraj aliaj bulgaraj natur-belaĵoj poezi-forme alternas unu la alian. Nur Violin Oljanov admiras naturan mirindaĵon ne-bulgaran en sia longvica, 12-silaba elvokiva poemo "La Dolomitoj" (RG). Am-poemoj kaj sinceraj, korvarmaj odoj al patrino, infanoj kaj patrolando ne multas. Inter la prozaĵoj aperintaj en *Almanako* elstariĝas emociaj priskriboj, kelkaj en la stilo de la taglibro tegitaj per literatura etoso, de Rajna Konstantinova kaj Nevena Nedelĉeva.


En *Rozo kaj glavo* trionon de la paĝoj okupas poemoj de nur tri poetoj: Dimitro Zlatarski, Asen Grigorov kaj Ĥristo Gorov. El aro da diversstemaj poemoj, kelkiuj estas

je amatora nivelo, dum el aliaj radias sentebla poezia esprimo. Neforigeble apudas impresoj, kvazaŭ kelkaj elfalis el la zamenhofa *Krestomatia* – kion certe multaj ne opinias manko.

Preseraroj en *Almanako* okupas tutan aldonitan liston. *Antologio* estas pli luksa aspekte kaj pli solida prese. En ambaŭ mankas biografiaj notoj pri la aŭtoroj.

Du libroj, multaj aŭtoroj, abundo da literaturaĵoj en tri branĉoj poezia, proza kaj traduka. Literatura kvalito ne elstara, kelkaj temoj rekte rifuzeblaj. Jen la bilanco; ĉu akceptebla aŭ ne, dependas de la aprez-angulo.

Emilija Lapenna (Jugoslavio)



A. Huleŝ, humane nobla A. Goodheir, kvazaŭ raportista V. Benczik. Aliflanke mi ne vidas grandan diferencon de poet-sintenoj inter "Venos la nova tag' paca sen burĝa band'" (K. Johansson, 1926) kaj "... vol' komuna kiel muro gardu, ŝirmu pacon mondan" (J. Kořinek, 1981). Ambaŭ enhavas ne tre precize esprimitan deziron, kun kies nobla esenco multaj facile konsentos, sed kiu kaŝas en si ankaŭ malpli facile kaj konsentige respondeblan "kiel?".

La malmultnombra esearo en ĉi tiu principe poezia antologio montriĝis al mi eĉ pli enhavriĉa ol la pli ol cento da poemoj. Individuismo kaj esperantismo (G. R. Ledon), turismo (P. Thorsen), vivo en socialismo (S. Ruszkiewicz), ŝanĝoj en la laborista vivo (S. Maul), postuloj rilate nunan instruadon kaj edukadon (J. M. Ipfelkofer), kaj influo de scienco je la homa scio (J. Régulo Pérez) – jen ses temoj traktitaj tiel, ke ne kun ĉio oni volonte konsentas, do simple – atentokapte.

Necesas substreki ankaŭ la gravecon de la tria librero. Aparta valoraĵo estas la ilustraĵoj de G. Kamaço: koncizaj, ofte trafegaj simboligaj, frapaj per pens-asociigoj. Vortpentrado de desegnaĵoj estas tamen tasko neoportuna kaj malmulte sencohava, anstataŭe mi do rekomendas la tutan libron. Ĝi estas nepre tre havinda volumo, kvankam mi volonte vidus en ĝi pli multajn ĉeftemerojn, inkluzive la socian dimension de Esperanto.

Wojciech Usakiewicz (Pollando)

Ĉu nur tiom pri la mondo?

Pandemonio: Noveloj, sciencaj artikoloj. Div. aŭtoroj. Malaga: Pandemonio, 1987. 80 p. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

Alberto Franco, Miguel A. Sancho, Georgo Kamaço, Francisko Ksaverio Moleono kaj María José Quesada estas tiuj "junaj hispanaj aŭtoroj", kies kontribuaĵoj konsistigas la demonlibron.

Ŝajne diabloj helpis bindi kune du tute malsamajn partojn, sciencon kaj literaturan. Fakte, la titolo "Sciencaj artikoloj" aspektas tro pretenda, ĉar sub ĝi troveblas ordinara scienc-popularigaj tekstoj, kiujn mi prefere lasu flanken kaj transiru tuj al "Rakonta prozo".

Komence ne malindas marki la novelojn tute bagatelajn ("Malantaŭ la pordo", "Rakonto en tri minutoj", "Pano buŝon ne serĉas" de F. K. Moleono, "Punenda peko" de M. J. Quesada, "Antaŭtagmeze" de G. Kamaço), kies kreo havis eble tiun pretekston, ke la aŭtoroj tre volis ludi per vortoj, trejni siajn verk-kapablojn, praktike provi kelkajn esprimojn. ... Rikardo F. A. R. en sia antaŭparolo ("Montriĝo") aludas pri la ioma nematureco de la aperigitaj verkoj. Jes, kaj la anoncita nematureco videblas en tio, kiel dokte la aŭtoroj uzas la verk-teknikon. Ili ĝin bone lernis kaj diligente aplikas. Ili zorge kombinas la tem-elementojn, trafe elektas vortojn, trovas nekutimajn esprimojn, ĝuste metas la kulminajn punktojn, scias surprizi ĉe la fino. Ĉio estas rafinita, precioza, algebra ... Planlingvo – planliteraturo?

En multaj rakontoj (precipe en "La lasta vojaĝo de kara Vilĉjo" kaj "La enĉerkigito" de A. Franco, "Ruĝa sangoban'" de G. Kamaço, "Hura!" de F. K. Moleono) mi sentas en la aŭtoroj fridajn observantojn, kiuj kontemplis iun eventon kaj jen rakontas pri ĝi senanime, senverve, indiferece ...


Morto ... morto ... estas la vorto, kiu ĉefrolas en la libro. Festeno de sobaj instinktoj, de fiksaĵaj ideoj (ekstremaj manifestiĝoj – en "Ruĝa sangoban'" de G. Kamaço kaj en "Ensuĉo" de M. J. Quesada). Kaj ŝajnas, ke la verkintojn interesas ĉefe la morto mem, sed ne tiuj homoj aŭ malhomoj kiuj mortas aŭ mortigas.

La "montriĝo" okazis, spektis ni la "novan bildon de mondvortigo", kaj aperis stranga demando: ĉu nur tiom pri la mondo?

Kio pleje imponas? La kovrilo. La fajra demono kaj ruĝaj literoj pentritaj sur la nigra fono impresas ... jes, impresas ...

Aleksandr Zagvazdin (Sovetunio)

Tibor Sekelj (1912-1988)



La 23-an de septembro 1988 mortis en sia hejmurbo Tibor Sekelj, eksterordinara pioniro de la internacia lingvo Esperanto. Vaste konata en kaj ekster la Esperanta komunumo kiel monda vojaĝanto, esploristo kaj aŭtoro, li krome ludis unikan rolon en la disvolviĝo de la postmilita movado.

Tibor Sekelj naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Spiška Sobota, en nuna Ĉeĥoslovakio, sed liaj gepatroj baldaŭ migris suden al Banato (hodiaŭa Rumanio kaj Jugoslavio), kie li fariĝis jugoslavia civitano. En la universitato de Zagreb li akiris licencion pri juro en 1934; ĉe la sama universitato li magistriĝis pri etnologio en 1982, preskaŭ kvindek jarojn poste!

De 1939 ĝis 1954 li loĝis en Argentino, kie li estis ĵurnalistoj. En tiu periodo li entreprenis siajn unuajn ekspediciojn: sur pinton de Akonkagŭa, sur Mato Grosso, tra Patagonio, Bolivio kaj pluraj aliaj sudamerikaj ŝtatoj. Liaj vojaĝoj rezultigis tutan bibliotekon da libroj en la lingvoj hispana, serbokroata kaj Esperanta (ekz. *Tempesto sur Akonkagvo*, 1959; *Nepalo malfermas la pordon*, 1959; *Tra lando de indianoj*, 1970; *Mondo da travivaĵoj*, 1981), kaj tradukoj aperis en trideko da aliaj lingvoj. Apartan mencion meritas *Elpafu la sagon*, antologio de buŝa poezio kiun eldonis UEA en 1983 en la Serio Oriento-Okcidento, kaj la infanlibro *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, kiu de post sia apero en 1979 tradukiĝis en preskaŭ dudek lingvojn kaj fariĝis furorverko en Japanio.

Esperanton Sekelj lernis en Zagreb ekde 1929 kadre de la fama Akademia Esperanto-Klubo, inter kies kunfondintoj li estis (kune kun I. Lapenna, I. Rotkviĉ kaj aliaj). Ĉie, kie li pasis dum la postaj jaroj, li agis por la movado: li estis fondinto de pli ol kvardek lokaj grupoj kaj ok landaj asocioj. Li estis ankaŭ unu el la pioniroj de la Hindia kaj Nepala movadoj. En la Komitato de UEA, kie li plenumis plurajn mandatojn – unue de 1946 ĝis 1966, kaj plej laste en 1983-1988 – li aparte klopodis pri la evoluigo de la movado en la Tria Mondo. Krome, li estis inter la fondintoj kaj la unua prezidanto de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio).

Aparte rimarkinda estis lia Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE), kiu pledis por sistemaj klopodoj utiligi Esperanton en ne-movadaj medioj. Tiu iniciato de Sekelj elkreskis en 1966 post dujara konflikto kun la politiko de UEA (tiam gvidata de lia kolego I. Lapenna), sed fakte liaj ideoj iom post iom akceptiĝis ankaŭ en ties kadro. Ideoj de IOE krome tre influis la jugoslavian movadon mem, el kio rezultis aferoj kiel la hodiaŭaj Internacia Kultura Servo (IKS), Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) kaj aliaj atingiĝoj, kiuj postvivis kaj IOE kaj ties fondinton. Unu el la premioj de PIF – tiu por la plej homama mesaĝo – portis la nomon de Tibor Sekelj ankoraŭ dum lia vivo.

Li estis aparte aktiva ĉe Unesko, kaj oni povas tute prave diri ke la rezolucio de Sofio 1985 estas fakte lia sukceso.

Ĉie li lasis spurojn tre klarajn: en la movado, en sia fako, en landoj kie li loĝis. Lia nomo troviĝas en enciklopedioj kaj infanaj libroj; liaj amikoj (kiel oni foje diris pri li) estis reĝoj kaj prezidentoj, sed ankaŭ ĝangalaj indianoj, hindiaj sanktuloj, kaj simpluloj ĉie tra la mondo. Kiel malmultaj sukcesas, li pruvis per sia vivo sian homaranecon: inspiro por novuloj en la kampoj kie li agis, kaj certe en la esperantista medio.

WALTER DÜHLER (1891-1988), unu el la refondintoj de ISAE post la Unua Mondmilito, multjara membro de la Akademio de Esperanto, mortis la 23-an de septembro. Kiel internacie renoma entomologo li verkadis por *Internacia Scienca Revuo*, ekz. pri la terminologio de la biontoj (1923). Samfakte li kontribuis al la *Enciklopedia Vortaro* de Wüster (1923) kaj al la *Plena Vortaro* (1933). Esperanto-biblioteko portas lian nomon.

LYYLI HEINÄNEN (1903-1988), honora membro de Esperanto-Asocio de Finnlando, forpasis en Mikkeli la 18-an de septembro. Profesie instruisto pri matematiko, ŝi aktivis ankaŭ kiel Esperanto-kursgvidanto kaj amatora astronomo. En 1983 asteroido, eltrovita de prof. L. Oterma, estis nomita laŭ ŝi.

INGA HELSINGIUS, dumviva membro de UEA, forpasis ĉi-jare en Turku, Finnlando.

RAGNAR HJORTH (1910-1988), multjara membro de Societo Zamenhof kaj fakdelegito pri arbarkulturo, iama vicprezidanto de Sveda Esperanto-Federacio, mortis en Stockholm en majo.

AKE HOLMEN (1927-1988) mortis ĉi-jare en Hammarö, Svedio, kie li estis fakdelegito pri biciklado.

GEORGIOS MIGGAS (1908-1988), honora prezidanto de Helena Esperanto-Asocio kaj longjara ĉefdelegito por Greklando, forpasis la 27-an de majo en Ateno. De 1971 ĝis 1985 li reprezentis sian landan asocion en la Komitato de UEA.

SØREN KRISTIAN NIELSEN (1905-1988) mortis la 8-an de junio en Fredericia, Danlando. Li estis delegito de UEA kaj prezidanto de la urba Esperanto-klubo (la plej granda en Danlando) de pli ol kvindek jaroj, kaj dum longa periodo li aranĝis nordiajn karavanojn al la Universalaj Kongresoj.

JULIA PIÓRO (1902-1988) forpasis la 18-an de majo en Piastów, Pollando. Esperantisto de 1956, ŝi rapide famiĝis kiel verkanto de fabelecaj rakontoj: unue en revuoj kiel *Pola esperantisto* kaj *Norda prismo*, poste en la libroj *El tero kaj etero* (1964) kaj *Hieroglifo* (1979). Iom poste montriĝis ŝia talento kiel metafizika poeto, interalie en *Fenestro kristala* (1981), *Esperanta antologio* (1984), kaj *Poemoj* (1987). Ŝia kompleta verkaro, sub la titolo *La mondo en meditado*, ampleksas pli ol 130 novelojn, ses teatraĵojn kaj 649 poemojn.

PAVEL ROSA (1906-1988), fondinto kaj honora prezidanto de Slovaka Esperanto-Asocio, mortis la 28-an de junio en Bratislava. Esperantisto de post 1923, li ludis centran rolon en la organizo de la postmilita movado en Slovakio. Elstaris lia propra ekzemplo kiel aktiva kursgvidanto, (kun)aŭtoro de lernolibroj, kaj tradukanto el la slovaka literaturo; li kontribuis al *Ĉeĥoslovakia antologio* (1935) kaj *Slovaka antologio* (1977). Li krome realigis la Esperantan version de la Fina Akto de Helsinko (1976). Multjara membro de UEA kaj dum dudek jaroj delegito en Bratislava, li ankaŭ oficis de 1977 ĝis 1981 kiel Komitatano A.

Belartaj Konkursoj de UEA 1989

En 1989 la Belartaj Konkursoj de UEA okazos la 40-an fojon. Ekde 1950, laŭ iniciato de Reto Rossetti, ili spronas originalan kreadon en la internacia lingvo kaj malkovris por la Esperanta publiko plurajn talentajn aŭtorojn. Nun UEA denove alvokas al partopreno, substrekante la aparte altajn kriteriojn de tiu ĉi plej prestiĝa literatura konkurso de la movado. Tiuj kriterioj validas por ĉiuj branĉoj. UEA precipe emfazas la gravecon de bona rego de Esperanto en la konkursaĵoj por la literaturaj branĉoj.

Konkursaj detaloj: Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri antaŭaj jaroj la unuan premion en la branĉo por kiu ŝi/li konkursas. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Maksimuma longo de konkursaĵoj ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Sen maksimuma ludodaŭro. Tri premioj.

Eseo: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la internacia lingvo Esperanto. Longo ĉ. 400 x 65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

Fotografio: Temo ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo en tiu jaro (publikigota en venonta numero de *Esperanto*). Minimuma formato 13 x 18 cm. Nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Kanto: Teksto kaj melodio (kiuj povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj) estu novaj kaj nepublikigitaj. Unu premio (Premio An-okin).

Infanlibro de la Jaro: Eldonejoj rajtas proponi infanlibrojn, ĉu originalajn ĉu tradukitajn, kiuj aperis en la jaro 1988. Unu premio.

Reguloj: La konkursaĵoj por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto (t.e. teksto kaj muziknotoj) devas esti senditaj en kvar ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Konkursoj: **Osmo Buller**,

PL 272, SF-90101 Oulu, Finnlando, kaj devas atingi lin plej malfrue la 31-an de marto 1989. En la fotografia branĉo sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, tiel ke la sendaĵo alvenu antaŭ la 1-a de julio. Por la infanlibra branĉo la eldonejoj devas sendi tri ekzemplerojn de la libro al la Centra Oficejo de UEA, kiuj alvenu antaŭ la 31-a de marto 1989.

La konkursaĵoj devas porti klaran indikon pri la konkursa branĉo kaj (escepte de la infanlibroj) esti signitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun la vera nomo kaj adreso de la konkursanto. Se la poŝtaj reguloj de la konkurna lando permesas, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkursas.

Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenos al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

La gajnintoj normale legas aŭ legigas la premiitajn verkojn en aparta kongresa aranĝo. Teatraĵoj povas esti luditaj aŭ legitaj, la kanto prefere prezentita de kantisto aŭ ĥoro. Oni okazigas ekspozicion de la premiitaj fotoj. Ĉiu premiito ricevas diplomon.

Premioj: Unua premio 310 gld.; dua premio 217 gld.; tria premio 124 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld. Premio An-okin 310 gld. Premio Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita) 217 gld. plus enskribo sur la pokalon Henry Harabaĝiu. Premio por Infanlibro de la Jaro 651 gld.

Regularo: Detala regularo havebla ĉe la CO de UEA kontraŭ unu respondkupono.

Nova Talento

Preludo kaj fugo

Dum la longaj vintraj noktoj, kiam
Triste tintas glacieroj, tiam
Senviviga malespero batas
Korojn. Lacaj arbskeletoj gvatas
Sub ĉielo nigre peza, kie
Mortopala luno senpasie
Ŝvebas inter densaj nubvualoj.
Tra l' aer' eksonas ŝtormtimbaloj.

Kaj la ter' atendas morne ĝis
Milda vent', per dolĉe varma kis'
Ĝojigas, fajfante gajigas!

Vekiĝas papilioj,
Flugetas tra l' folioj,
Koketas al la bravaj
Burgonoj verde flavaj.
Senzorge, jubilante,
Sur branĉoj babilante
Birdetoj pepas flue.
Fanfaron blovas ĝue
Trumpetoj dafodilaj
Al sunradioj brilaj.
Ridetas la primoloj,
Malkaŝas sin violoj.
La tuta mondo festas:
Printempo ja ĉeestas!

Krys Ungar (Britio)

Laste aperis...

Mi estas esperantisto. Kiel mi aktivas, kiel ĝuas? Smail Grbo. Borovo: Voĉo, 1988. 136p. 17cm. Ilus. Nekutima kolekto de rakontoj kaj opinioj de iusence tipa, iusence malordinara movadano. 15,00 gld.

Pasporta servo 1988-89. Budapeŝt: TEJO/Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 70p. 20cm. 15-a eldono de la listo de gastigantoj: ĉ. 900 el 58 landoj (sen mapoj). 7,50 gld.

Pasporto vegetarana. Komp. Menno Abbas k.a. Noordlaren: Nederlandse Vegetariërsbond, 1983. 80p. 22cm. Mapoj. Klarigo pri la manĝbezonoj de vegetarano/vegetalano en 72 lingvoj. 13,20 gld.

Patrino koro. Nevena Nedelčeva. Rotterdam/La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eldono/preso). 148p. 17cm. Beletraj Kajeroj 47. Simplaj, romantikaj rakontoj pri la esperantista vivo. 12,00 gld.

Paŭlo Lengyel: esperantista presisto, ĵurnalisto, akademiano. D-ro Mihály Szilágyi. Szekszárd: Szekszárdi Nyomda, 1988. 136p. 20cm. Bind. ISBN 963-01-88-70-8. Dulingva eldono de biografia studo pri ŝlosila movada pioniro (1868-1932; i.a. eldonanto de *Lingvo internacia*); kun krestomatieto el ties artikoloj. 21,00 gld.

Perfekta civitano. Plena novelaro de Sándor Szathmári (1897-1974). Bibliografio komp. de Karl Pov; postparolo de Vilmos Benczik. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 456p. 20cm. ISBN 963-571-178-6. Ĉiuj 27 noveloj, satire akraj aŭ filozofie pensigaj, de unu el la plej grandaj Esperantaj prozistoj. 39,00 gld.

Praavo kaj la kotokukoj. Sigrún Eldjárn, el la islanda esperantigis Ragnar Baldursson, japanigis Sari Ohyama. Tokio: Libroteko Tokio, 1988. 28p. 18x25cm. Bind. Kolorilus. Ĉarma dulingva rakonto pri kvarjara knabino kaj ŝia kunludema praavo. 15,00 gld.

Proverbaro Esperanta. L. L. Zamenhof (1859-1917), ordigis kaj provizis per indeksoj Camille Rogister. Enkonduko kaj postparolo de Gaston Waringhien. La Laguna: Stafeto, 1974. 168p. 19cm. Beletraj Kajeroj 10. La plej bona eldono iam preparita de la 2630 zamenhofaj proverboj. 18,00 gld.

Provizora privata listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de nordokcidenta Eŭropo. W. F. Pilger. Lelystad: Vulpo-libroj, 1982 (kun aldona folio, 1988). 72p. 21cm. ISBN 90-70074-31-1. "Uzebla same por amatoraj botanikistoj kaj por homoj kiuj simple volas priparoli iujn sovaĝajn plantojn." 2,10 gld.

Realo kaj garantioj de la sekura mondo. Miĥail Gorbaĉov, el la rusa trad. E. Ševĉenko kaj L. Novikova. Moskvo: APN, 1987. 16p. 19cm. Artikolo okaze de la 42-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, kun proponoj por "universala sistemo de sekureco". 1,20 gld.

Renovigan ideologion por la revolucia rekonstruo. Miĥail Gorbaĉov, kolektive trad. el la rusa. Moskvo: APN, 1988. 48p. 19cm. Parolado de la sovetia gvidanto en la Plenkunsido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio, feb. 1988; unu el la gravaj priskizoj de la t.n. "perestrojko". 1,50 gld.

Sankta Johano. Swindon: La Brita kaj Alilanda Biblia Societo, 1988. 36p. 13cm. Poŝformata represo de la kvara Evangelio. 1,20 gld.

Simha. Rakonto pri ĝojoj. Isak Samokovlija (1889-1955), el la serbokroata trad. Jovan Zarkoviĉ. Antaŭparolo de Ivo Andriĉ, postparolo de Staniša Tutnjeviĉ. Sarajevo: ELBiH, 1988. 110p. 20cm. Malriĉa ŝuisto trovas meze de la vivdezerto "oazetojn de ĝojo kaj feliĉo"; unu el la ĉefverkoj de sefarda bosnia rakontisto. 21,00 gld.

Somera tago kaj Aŭtuna vespero. Inger Brattström, el la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1988. 52p. 21cm. ISBN 91-8732-03-7. Du noveloj pri juna paro, Anna kaj

Daniel, kiuj lernas pli bone koni unu la alian dum someraj aventuroj. 10,20 gld.

Surbaze de plena egalrajteco, suvereneco, reciproka respekto. Miĥail Gorbaĉov, kolektive trad. el la rusa. Moskvo: APN, 1988. 16p. 19cm. Parolado de la sovetia gvidanto en Beogrado, Jugoslavio, marton 1988, kie li i.a. agnoskis la rajton de aliaj socialismaj ŝtatoj al propravoja evoluo. 1,50 gld.

Ŝia lasta poŝtkarto. Sergo Elgo. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 1988. 225p. 21cm. Subita kaj mistera malapero de junulino naskas tradician krimromanon, en kiu detektivo sekvas verajn kaj trompajn fadenojn al la "ĝusta" solvo – aŭ ĉu? 42,90 gld.

Tentiĝoj de Adamo, La. A. Lopez Luna (1914-). Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1987 (neindikita). 104p. 17cm. Mimeo. ISBN 950-43-1688-3. Rakontetoj pri la rilatoj al virinoj de la aŭtoro. 8,10 gld.

Esperanton kielioppi. Veli Kolari. Hyvinkää: Oy Mendoservo Ak, 1988. 44p. 21cm. ISBN 951-96076-1-7. Konkiza finnlingva gramatiko. 11,10 gld.

Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas. Manjo Austin. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 128p. 21cm. Serio "Stafeto" n-ro 6. Plenkresko de adoleskulino en trankvila irlandia urbeto, rakontita senmetafore sed ne sen romantiko. 18,00 gld.



Ankoraŭ freŝan novaĵ-valoron havas la APN-broŝuroj.

Vortaro Esperanta-hebrea kun krestomatio. Komp. d-ro Henryk Mashler, red. kaj kompletigis Josef Murĵan. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo en Israelo, 1987. 55p. 23cm. 10,20 gld.

Une langue de communication internationale: l'espéranto. Raymond Gueguen. Limoges: la aŭtoro, 1988. 50p. 21cm. ISBN 2-9501857-2-X. Bazaj informoj pri la movado. 12,90 gld.

Une langue pour tous: l'espéranto. Eduardo Vivancos. Paris: Groupe Fresnes-Anthony, Fédération Anarchiste, 1987. 64p. 21cm. "Volonté Anarchiste", ISSN 0181-43-89, n-ro 34. Dulingva (franca-Esperanta) versio de hispanlingva informilo el 1975. 7,20 gld.

DIVERSAĴOJ

Filatelajo: Kubo. Koverto unua kongreso (poŝtostampo). 3,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Konatiĝi deziras . . .

Kiel komencantino mi partoprenis la E-kongreson en Roterdamo. Mi rimarkis ke estas iom malfacile kontakti aliajn homojn. La plimulto el ili jam konis aliajn de antaŭaj kongresoj aŭ venis grupe. La konversaciaj grupoj proponis laŭ mi bonegan okazon, sed ili ĉiuj okazis samtempe, je la horo planita por la matenmanĝo. La diversaj prelegoj kaj diskutoj, kvankam tre interesaj, proponis nur etan ŝancon alparoli aliajn homojn pri tro specifa temo, ne sufiĉe konata de mi. Pro tio jen kelkaj demandoj:

1. Ĉu ne eblus aranĝi la konversaciajn rondojn je diversaj horoj dum la tago?

2. Ĉu ne eblus instali en la granda halo konversacian anguleton por komencantoj?

3. Ĉu ne eblus organizi pli da malstreĉigaj aktivaĵoj, kiuj ebligis komenci interparoladojn kun aliaj esperantistoj?

Tiuj rimarkoj tute ne forgesigas al mi tiun mian 1-an kongreson, kiun mi tre ĝuis kaj kie mi trovis kelkajn novajn geamikojn.

Hedwig Van der Velden (Belgio)

La forto de la amikeco

Mi legis kun admiro la proponon de Gottfried Hofstätter el Aŭstrio (majo, p. 84), kie li proponis kotizon al UEA de neesperantistoj. Mi dividas lian ideon, sed krome mi aldonas aliajn konsiderojn. La organizaĵoj historie venkintaj uzis ĉiam aliajn organizaĵojn por multobligi la proprajn fortojn; kial ne stimuli krei sekciojn, organizaĵojn, eĉ asociojn el amikoj de Esperanto — eble laŭnacie aldone kun aliaj devizoj, la paco, la konservado de la naturo ktp. Kompreneble, tio alportus kapdolorojn, sed ĝi ja multobligus la fortojn de la naciaj asocioj, por, ekzemple, peti la oficialan instruadon de Esperanto, fari kampanjon por konkretaj lokaj atingoj ktp. Kiel varbon, la Esperantaj organizaĵoj povus oferti diversajn servojn eĉ internaciajn al tiuj sekcioj aŭ asocioj.

Arnoldo Aguila (Kubo)

Ni mem devas lerni Esperanton!

Reage al la artikolo de Bernard Golden (aprilo, p. 74-75), mi plene konsentas kun li. Ekzemple, en la antaŭa jaro mi ricevis leteron de alilanda delegito pri turisma servo. Sed la letero, kiu ampleksis tekstokvanton nur iom pli grandan ol tiu ĉi letero, enhavis pli ol 40 erarojn. (Komencanto povus trovi la duonon!) Tiu delegito jam minimume kvin jarojn oficas, kaj ek-lernis Esperanton (se mi bone komprenis lian parolon) antaŭ la dua mondmilito. Kaj kion pensi pri redaktoro de revuo, kiu plenigas grandan parton de tiu revuo per preskaŭ laŭvortaj "tradukoj" el la nacia lingvo, do per nacilingvaj tekstoj kun Esperanto-vortoj? Mi ja povus daŭrigi, sed mi rezignas por ne okupi tro da spaco. . . .

Ni do ĉiuj daŭre lernu Esperanton. Sed ĉu ni disponas la bezo-

Kun aŭ kontraŭ?

Kun ne malgranda miro mi estas leginta en *Esperanto* 88/6 p.118 en "Laste aperis . . ." jenan sciigon:

"Sur la vojoj de la Analiza Skolo. Artikoloj k.s. pri gramatiko kaj lingvouzo, laŭ kontraŭ-PAGa tendenco. Prezo: 39,90 gld."

En paĝo 6 de tiu libro ĉiu interesiĝinto povas legi jenan dediĉon:

"Mi dediĉas ĝin al la redaktintoj de la Plena Ilustrita Vortaro kaj de la Plena Analiza Gramatiko, precipe al prof. Gastono Varengjeno. La du cititaj verkoj restos la plej imponaj monumentoj de la unua jarcento de Esperantismo. Ili kunigas preskaŭ neelĉerpeblan materialon pri nia lingvo. Sen ili, kiujn mi preskaŭ ĉiutage konsultas, tiu ĉi libro ne ekzistus."

Mi do petas vin pri ĝustigo de la bedaŭrinda malveraĵo, kiu ne povas pretendi la pardonemon, kiun ni volonte koncedas al tajperaroj. . . .

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

Red.: Kvankam kontraŭ-PAGa estas eble tro forta, ĝi tamen laŭ mi indikas esencan trajton de la libro, pri kiu devus konscii aĉetonto. Mi citu el alia letero de s-ro Ŝulco, kiel

natajn lernolibrojn? . . . Eble ja valorus ekzemple malpli ampleksa sed tamen bona gramatiko, kiel proponita en la sama numero de la revuo. Kaj ĉu utilis aperigi libron pri tiuj tre oftaj eraroj? Kiu ĝin verku?

Rob Keetlaer (Nederlando)

Ĉu malsukcesis ĉio alia?

En la TEJO-parto de la UEA-raporto aperas vera perlo de organiza strategio. "Se ni volas haltigi la konstantan malkreskon de la nombro de individuaj membroj, tiam ni devas tamen ion entrepreni," estas dirite, kaj jen la entreprenaĵoj:

1) plialtigo de la kotizo de TEJO-patronoj, 2) propono pri plialtigo de la aĝlimo. Organizaĵo, kiu ne povas entrepreni ion plian por sin kreskigi, per tio pravas sian vanecon.

Ridinde!

Osmo Buller (Finnlando)

ekzemplon de tiu tendenco:

"Kun vera ĝojo mi estas leginta tiun delikatasentan kaj aparte kompreneman recenzon de s-ro Gerrit Berveling [*Esperanto* 1988/p.73]. Kaj mi estas tre danka pro ĝi!

Tamen ŝajnas necese al mi atentigi pri certa miskompreno, por ke Esperantistoj ne tro lingvokonsciaj ne falu en eraran lingvouzon. La uzo de la preterito en objektaj subpropozicioj kiaj 'mi vidis, ke li alvenis' (anstataŭ 'mi vidis, ke li alvenas') ne estas misa, sed ĝusta Esperanto.

La regulo estas simpla kaj kategorio: 'Ĉiu verbo en subpropozicio havas la saman tempon aŭ modon, kiun ĝi havas, se ĝia propozicio fariĝus memstara.'

Legintoj de paragrafoj 269-271 de PAG konstatos, ke tiu "regulo" estas rekte kontraŭa al la PAGa analizo kaj al la ĝenerala lingvo-uzo. Mi opinias la laborojn de s-ro Ŝulco certagrade utilaj, sed nepre ne ŝirmeblaj sub la Varengjena ombrelo. Interesatoj trovos escepte bonan analizon de la Skolo en Speciala cirkulero 54, havebla de Paderborna Esperanto-Centro, FRG, el la plumo de Bertil Wennergren (Svedio).

● **Aŭstralio:** Pli ol 200 homoj el 15 landoj partoprenis la Tutpacifikan Kongreson septembre en Brisbano. Ĝin alparolis membro de la nacia Senato, s-ro Macklin, pri la rolo de Esperanto en transformo de la nunaj strukturoj kaj kulturo de la mondo. Dum la inaŭguro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, prezentis la Premion Onisaburo Deguĉi 1988 al eks-ambasadoro Ralph Harry (foto). Ĉina Esperanto-Ligo, kiu havis kelkajn reprezentantojn ĉe la kongreso, proponis sin kiel la organizanton de la 5-a Tutpacifika Kongreso en 1992, en la havenurbo Qingdao (Ĉingtaŭ).

● **Britio:** Norman Williams, dum multaj jaroj la sekretario-administranto de la junular-subvencia Norwich-a Jubilea Esperanto-Fonduso (NoJEF), donacis sian Esperanto-bibliotekon al Universitato John Rylands en Manĉestro. Temas pri unu el la plej ampleksaj libro-kolektoj en Britio, kiu ekde nun estos alirebla por kaj studentoj kaj la ĝenerala publiko.

● **Ebura Bordo:** Laŭ lastatempa raporto de Hyacinthe Seka, ĉ. 150 homoj nuntempe lernas Esperanton ĉi-lande: 50 gejunuloj en unu liceo, 42 aliloke en la ĉefurbo Abiĝano, kaj ĉ. 50 en dek tri aliaj urboj. Eburborda Esperanto-Asocio (BP 77, Guiglo) sukcesis aranĝi vizitojn, instruadon kaj aliajn kontaktojn, krom televida kaj radia elsendoj kaj ekspozicio en la nacia biblioteko (*Esperanto* 1988/p. 57).

● **Francio:** La 14-an de junio inaŭguriĝis strato Esperanto en nova kvartalo de Eysines, urbo de ĉ. 18 000 loĝantoj apud Bordeaux. La Esperanto-fako de "Laika Amikaro" transdonis al la urbestro 538 gratuleterojn el 24 landoj.

Dum aŭgusto 1988 la nacia radio France-Inter elsendis Esperanto-kurson dum deko da minutoj ĉiutage (krom dimanĉe). La kurson gvidis anglo Richard Comerford, instruante la lingvon al la gvidantino de la elsendo, Brigitte Vincent, aŭdigante kantojn kaj premiante telefon-



Yosimi Umeda (centre) prezentas la Premion Deguĉi 1988 al Ralph Harry.

vokantojn ĉiusabate per Esperanto-vortaro. La iniciato venis de Henri Masson, SAT-Amikaro.

● **Germana DR:** Aperis nova kaj plaĉa plenkolora prospekto pri la kasteloj kaj parkoj de Potsdam-Sanssouci. Ĝi haveblas pere de UEA. Same multkolora libreto *Naturprotektado en Germana Demokratia Respubliko* haveblas senpage de Landwirtschaftsausstellung der DDR, agra-buch, Raschwitzer Strasse 11/13, DDR-7113 Markkleeberg.

● **Malagasio:** Universala Kultura Servo celas krei instruistojn en ĉiuj 115 departementoj de la insulo, kaj en junio 1989 sendos la plej bonan kurson al La Chaux-de-Fonds, Svislando, dank' al helpo de la tiea Kultura Centro Esperantista. UKS krome proponas turisman programon al eksterlandaj esperantistoj por la dua duono de aprilo 1989. Informpetojn (5 irk) kaj materialan apogon sendu al BP 1663, 101 Antananarivo.

● **Meksikio:** La Jubileo donis grandan impeton al la meksikia movado, aparte ekde bone organizita festo en oktobro 1987. Nun kunlaboras la landa bahaa asocio (home kaj finance), kaj la junularo ekludas pli grandan organizan rolon. Ekspozicioj kaj prelegaroj ĉe la kulturcentro de la nacia universitato vekis publikan intereson, tiel ke venis ĉ. mil informpetoj post unu televida intervjuo.

● **Tanzanio:** Fondiĝis Kilomanjara Esperanto-Klubo, en rifuĝ-tendejo proksime de la urbo Tabora; la klubo kunigas rifuĝintojn el Zairio, Tanzanio, Mozambiko kaj Molavio. Pro la rezulta multlingveco, bonvenas instrumaterialoj en la franca, angla, portugala kaj svahila. Sendu al: KEK, PO Box 669, Tabora, Tanzanio.

● **Togolando:** En julio Unuiĝo Togolanda por Esperanto partoprenis du-semajnan re-arbarigan kampanjon de la Federacio de Unesko-klubo, ĝia tegmenta organizaĵo, kaj okazigis specialan kurson por la 205 kunlaborantoj. Tiun agadon sekvis seminario por kursgvidantoj, kiun partoprenis 20 togolandanoj kaj unu beninano.

● **Usono:** En tiu ĉi fortikaĵo de la angla, aliaj lingvoj fariĝas pli kaj pli signifaj en la ĉiutaga vivo. Lastatempe informfolio de la kalifornia telefonkompanio surhavas, apud la angla, hispanan, ĉinan, vjetnaman kaj korean tekstojn.

Relative malmultaj homoj partoprenis la ĉi-jaran Someran Kursaron ĉe la Ŝtata Universitato ĉe Sanfrancisko, sed malgraŭ tio la etoso estis tre internacia: venis homoj el Japanio, Kanado, Rumanio, Bermudo, Ĉinio, kaj instruistoj laŭdevone angla, germana kaj hebrea. Se vi vojaĝos somere al Usono, petu informojn pri tiu fama trisemajna plur-nivela kursaro ĉe 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010, Usono.

● **Venezuelo:** Membroj de Venezuela Esperanto-Asocio ĉeestis en aprilo internacian packonferencon en Mérida, organizitan de Monda Pac-Konsilio kaj Universitato de la Andoj, kaj argumentis por la rolo de Esperanto. En marto la Asocio starigis kulturan fondaĵon, "FundaEsperanto", kiu celas kolekti monon por asocia sidejo kaj por kultura, scienca kaj eduka agado. Donacoj, membriĝoj estas bonvenaj. el la tuta mondo: p/a VEA, Apartado 3833, Caracas 101, Venezuelo.

● **Vjetnamio:** La 23-an de julio fondiĝis oficiala Esperanto-klubo ĉe la ŝtata Laborula Kulturdomo de la urbo Ho Chí Minh. La prezidanto estas d-ro Lê Nhiêm, ekonomia direktoro de la Sajgona Haveno; vicprezidanto, la profesia tradukisto kaj aktiva esperantisto s-ro Ngô Chấn Lý. Por helpi sian disvolviĝon, la grupo aparte petas vizitojn de ali-landaj esperantistoj: kontaktu ilin ĉe Esperanto-klubo, NVH LAO BÔNG, n-ro 55 Xô Viết Nghệ Tĩnh, TP Ho Chí Minh, Vjetnamio (tel. 90288-94254).

Persone

● **Echeverria:** S-ro Luis Echeverria, iama prezidento de Meksikio kaj la nuna ĝenerala direktoro de la Monda Centro de Sociaj-Ekonomiaj Studoj (evolulanda esplor-organizo), subtenas pli seriozan atenton al Esperanto flanke de la UN-sistemo. En diskut-forumo en Novjorko pri la rilato malarmado-evoluo, li respondis al demando de Julius Manson (UEA) interalie jene: "Mi kredas, ke necesas pliigi la strebojn al universala frateco. Nun, kiam la homaro . . . frontas komunan danĝeron, mi pensas ke la pledantoj por Esperanto ekhavas novan ŝancon. . . . Sendepende de teknikaj obstakloj, iu ajn kampanjo kultur-kampa por kompreniĝo inter la popoloj estas io pozitiva per si mem. Se mi pli scius pri la detaloj de Esperanto-instruado, mi plej verŝajne povus pli entuziasme apogi la ideon, ke oni instruu ĝin pli vaste inter junuloj kaj infanoj por plia interkomunikado. Mi kredas, ke ĉio ĉi tre meritas pripensadon kaj plustudon."

Fake

● **Blinduloj:** 107 personoj el 17 landoj partoprenis la 56-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj, de 30 julio ĝis 6 aŭgusto en Vught, Nederlando. Krom prelegoj, ekskursoj kaj aliaj programeroj, okazis vigla diskuto pri la situacio de blinduloj en evolulandoj, surbaze de la spertoj i.a. de Fan Dongsheng (Ĉinio). Sugestojn kaj kontribuojn por helpagado al evolulandaj blindaj esperantistoj akceptas: P. A. M. v.d. Berg, Schuitemakerstraat 11, NL-1964 TJ Heemskerk, Nederlando.

Esperanto kaj la ĉina dividas ĉefan poŝtmarkon (vd. "Filatelo", sube).



● **Filatelo:** Ĉe la tutmonda poŝtmarka ekspozicio en Prago, Ĉeĥoslovakio, de la 26-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro, s-ro Vláša Váňa gajnis arĝentan medalon pro sia Esperanto-eksponaĵo. Unu el la porokazaj poŝtmarkoj pri la ekspozicio, kiujn eldonis la ĉeĥa registaro, portas Esperantan tekston.

En Ĉinio aperis du poŝtmarkoj honore al Cai Yuanpei, intelektulo kaj influhava Esperanto-pioniro el la unua kvarono de ĉi tiu jarcento. La unuataga poŝtostampo, la 11-an de januaro 1988, portis tekstojn en la ĉina kaj en Esperanto. Ĉina Esperanto-Eldonejo krome aperigis mirinde kompletan plenkoloran katalogon de E-poŝtmarkoj, kiu baldaŭ haveblos de UEA. . . . En Changsha fondiĝis filatelista ligo: kontaktu ilin p/a Wu Chang Shen, 1 Jiefang Donglu, Changsha, Hunan, Ĉinio.

● **Filozofio:** Kvin jarojn post la fonda de Filozofia Asocio Tutmonda kaj ties revuo *Simpozio*, la filozofa agado en Esperanto plu kreskas. En Brazilo nun ekzistas Kultura Fondaĵo Simpozio, la nova internacia branĉo de jam ekzistinta kulturfonduso enlanda: ĝi finance subtenas la revuon, Eldonejon Simpozio, kaj la projekton de

Filozofia Enciklopedio (por kiu ĉ. 60 artikoloj estas jam aperintaj, ankaŭ mendeblaj kiel folioj). Ĉe la Monda Kongreso de la Federacio de Filozofiaj Asocioj, en Britio meze de aŭgusto, FAT-anoj disdonis flugfoliojn pri la celo kaj agado de FAT. Donacojn sendu al la konto simp-k ĉe UEA; informopetojn al la redaktoro de *Simpozio*, Rua Cons. Mafra 176, BR-88000 Florianópolis-SC, Brazilo.

● **Monumentoj:** Je la 26-a de julio 1988, Hugo Röllinger (Theres.-str. 23, D-873 Bad Kissingen, FRG) estis registrinta 731 objektojn nomitajn laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. . . . El Japanio ni ricevis novaĵojn pri la uzo de Esperantaj vortoj en nomoj: ŝargŝipo por fluidaj kemiaĵoj *Pina vento* vojaĝas inter Japanio kaj Kanado (ĝin posedas oomotano s-ro Osamu Abe), kaj Terkulturista Kooperativo Sumita produktas fragokonfitaĵon sub la marko "Frago".

● **Rokmuziko:** Francaj esperantistoj fondis la asocion Eurokka, kun la celo trejni rokmuĝikistojn kaj popularigi Esperanton inter ili. La asocio havas ĉiusemajnan programon ĉe la loka radiostacio de Tuluzo, kaj serĉas internaciajn kontaktojn. Skribu al Radio FMR, Esperanto-redakcio, 9 bis Avenue Frédéric Estebe, F-31200 Toulouse, Francio.

● **Ŝako:** Esperanta Ŝak-Ligo Internacia ĉi-jare festas sian tridekan datrevenon. Ĝia agado ampleksas la kvarjarajn ŝak-olimpikojn, nun daŭrantan korespond-turniron honore al la Jubileo, ŝakrevueton, k.s. Nun ekis plano aperigi la orientgermanan *Gambit Revue* ankaŭ en Esperanto, se sufiĉe da abonantoj anonciĝos. Kontaktu Hans Schilling, Amtsstr. 10, DDR-1170 Berlin, Germana DR.

● **Telekomunikiloj:** La eŭropa satelito *Olympus*, lanĉota en 1989, celas ebligi internaciajn eduk-elsendojn kiujn povos ricevi malmultekosta aparato en ies ajn hejmo aŭ laborloko. La internacia laborgrupo pri tiuj elsendoj interesiĝas pri la malpli parolataj lingvoj kaj ankaŭ pri Esperanto, dank' al interveno de Maire Mullarney (Irlando). Skribu subtene en iu ajn lingvo al Donal O'Riagain, European Bureau for Lesser Used Languages, 7 Merrion Square, Dublin 2, Irlando.

Kongresa Komuniko



**74-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Brajtono (Brighton), Anglio,
29 julio - 5 aŭgusto 1989**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

**Adreso de LKK: Esperanto-Asocio de Britujo,
140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio**

Loka Kongresa Komitato: La ĉi-jara organiza komitato konsistas el dek kvar membroj, ĉefe el Londono: d-ro John C. Wells (prezidanto); s-ro Ian Jackson kaj s-ro Amador Diaz (vicprezidantoj); s-ro W.G. Atkinson (sekretario); s-ino V.B. Atkinson (protokolisto); s-ro Peter A. Danning (kasisto); s-ro Robert Alexander (loĝado); s-ino Sally Phillips kaj s-ro Edward Griffiths (ekskursoj); s-ro Don S. Lord (artaj aranĝoj); s-ro Robert Haddon (junularaj aranĝoj); s-ino Helene M. Fantom (infana kongreseto); s-ro Jonathan Cooley (informado); kaj s-ro Peter Oliver (grafikaĵoj).

Unua Bulteno kaj aliĝilo: Tre alloga Unua Bulteno estas donaco de la flugkompanio British Airways, kiu provizis la ŝelon sur kiun oni surpris la Esperantan tekston. La unuaj dek mil ekzempleroj tre rapide elĉerpiĝis. Multaj estis disdonitaj dum la 73-a UK en Roterdamo, kaj la ceterajn oni dissendis kun la revuo *Esperanto* kaj al opaj kongresaj perantoj. La dua preso estos iom alitipa (ĉar intertempe elĉerpiĝis la stoko ĉe British Airways), sed kun la sama teksto. Aliĝiloj estis presitaj en 30 000 ekzempleroj, disdonitaj dum la 73-a UK en Roterdamo, kaj senditaj al kongresaj perantoj kaj abonantoj de la revuo. Aliĝiloj kaj bultenoj estas haveblaj senpage ĉe la konstanta kongresa adreso.

Dua bulteno: La dua kongresa bulteno estos preta ĝis la fino de la jaro kaj entenos ĉiujn necesajn, la plej freŝajn kaj detalajn informojn. Aliĝintoj en la unua kotizperiodo (ĝis la 31-a de decembro) ricevos ĝin komence de la jaro. Oni prefere eluzu tiun avantaĝon.

Kotizoj: Ĝis la 31-a de decembro validas la plej malalta tarifo: individua membro de UEA 150 gld., nemembro 188 gld., kunulo/junulo/handikapulo-membro de UEA 75 gld., kunulo/junulo/handikapulo-nemembro 112 gld. La tarifo por netranspagipovaj landoj kaj por ĉiuj landoj de Afriko, Latina Ameriko kaj Azio (krom Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) estas duona.


Glumarkoj: Jam aperis plaĉaj plurkoloraj glumarkoj kun la kongresa simbolo (kies specimenon vi povas vidi supre en tiu ĉi paĝo). Ili estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA: 1 folio de 16 markoj kostas 3,60 gld. (Por Nederlando la prezo estas 4,30 gld. Triona rabato ekde dudek folioj.)

Londona lanĉo: Ĉar la kongreso okazos ekster la ĉefurbo, oni organizas specialan antaŭkongresan aranĝon en Londono, dum kiu oni solene "lanĉos" la kongreson kaj prezentos ĝin al la britaj eminentuloj kaj eksterlandaj diplomatoj. La lanĉo okazos en la fama *Guildhall*, kie oni akceptis ankaŭ Zamenhof en 1907. Apartaj aliĝiloj por la lanĉo baldaŭ aperos. Kotizo por la lanĉo estas 75 gld. Krom la solenan parton kun manĝeto oni antaŭ-

vidas ekskurson tralondonan kaj vesperan programon. La organizantoj ankaŭ prizorgos loĝadon en londonaj hoteloj.

Postkongresaj aranĝoj: Oni antaŭvidas tri postkongresajn ekskursojn: 1) oficialan postkongreson en Irlando, kun flugo de flughaveno Gatwick, restado en Dublino, kaj du tuttagaj ekskursoj; 2) aŭtobusan ekskurson al Norda Kimrio, kun restado en Llandudno; kaj 3) aŭtobusan ekskurson al Skotlando, kun po-tritaga restado en Edinburgo kaj Glasgovo.

Infana kongreseto: Ĝi okazos en la privata lernejo *St. Aubyns* en Rottingdean, proksime de Brajtono. La 250-guldena kotizo, kiu inkluzivas ĉiujn manĝojn ktp, estas pagenda al la konstanta kongresa adreso. La gepatroj kiuj volas aligi siajn infanojn bonvolu anonci tion kiel eble plej frue al UEA-komisiito Christopher Fettes (St. Columbia College, Rathfarnham 16 Dublin, Irlando), por ke la infanoj povu ekkontaktiĝi jam antaŭ la renkontiĝo en Brajtono.



Brajtono kaj la ĉirkaŭa regiono proponas historiaĵojn kaj kuriozaĵojn al la turisto. Jen la 19a-jarcenta Reĝa Pavilono.

Loĝado: Estos disponeblaj pli ol 1800 litoj, en diverskategoriaj hoteloj kaj en malmultekosta amasloĝejo. En altkategoria hotelo prezoj povus varii inter 140 kaj 220 guldenoj tage por lito en dulita ĉambro, kaj inter 200 kaj 280 guldenoj por tranokto en unulita ĉambro. En mezklasaj hoteloj tranokto en dulita ĉambro kostos inter 80 kaj 140, kaj en unulita inter 80 kaj 200 guldenojn. En pli modestaj hoteloj kaj tranoktejoj la tagprezoj varias inter 40 kaj 80 guldenoj. Ĉiuj prezoj inkluzivas abundan anglan matenmanĝon. Tranokto kun matenmanĝo en la universitato (rande de la urbo, sed kun bonaj trafikligoj) kostos 67 guldenojn tage. Eblas mendi ankaŭ tranokton sen matenmanĝo, en studenta hejmo proksime al la universitato, por ĉ. 106 guldenoj semajne.

Korekto al la Unua Bulteno: Pro teknika eraro estis ellasita la adreso de la dua peranto por Danlando. Lia adreso kaj komisiado do plu validas, kiel kutime: s-ro Gustav Kühlmann, Løvetandsvej 12, 2700 København Brønshøj.

Internacia Servo Adresara "Feliĉa Estonteco" daŭrigas sian laboron pri interkontakigo de homoj solaj kaj timemaj. Sendu personajn kondiĉojn kaj dezirojn plus du bildkartojn kaj unu respondkuponon al Ewa kaj Ryszard Starzynscy, str. Broniewskiego 3a/24, PL-59-840 Zawidow, Pollando.

Pri pupteatro: La Ŝtata Pupteatro de Bulgario (prezentinto de *La ovo* en Krakovo kaj Varsovio) plivastigas sian per-Esperantan programon kaj serĉas fremdlandajn pupteatr(ist)ojn kun kiuj interŝanĝi spertojn. Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bv. vidi la kolofonon.

Anoncetoj

19-jara tanzaniano dez. kor. pri historio, turismo, fotografado; tre ŝatas futbalon, muzikon; lernas agrikulturon kaj poste studos ĵurnalismon. Makanda David Mchelew, Pk. 1051, Bunda-mara, Tanzanio.

Nove fondita Pola Studenta Esperanto-Teatro havas ambician kaj riĉan programon. Volonte kunlaborus kun ĉiuj kiuj kreas E-kulturon kaj interesiĝas pri ĝi. Mariusz Zak, ul. Jutrzenki 21/11, P-43300 Bielsko-Biala, Pollando.

22-jara studentino dez. kor. pri la vivo en diversaj landoj; interesiĝas pri fiziko, matematiko, filmarto kaj multaj aliaj temoj. Marta Jasińska, ul. Kadlubek 24a/10, PL-32-500 Chrzanów, Pollando.

Nica literatura revuo. Se vi serĉas mankanta(j)n numero(j)n, mendu ilin ĉe ni (prezo: po 3, – DM): Artur E. Iltis, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

"Stafeto"-serio prezentas:

murdo en esperantujo

Daniel Moirand

Kviete fluetas la kluba vespero, kiam subite malfermiĝas la pordo kaj envenas nekonata viro. Kiam li atingas la tablon, li teren kolapsas. Morta!...

Pro tiu okazaĵo leŭtenanto William Hammerkopf eniras la Esperanto-mondon. Ĉu li trovos tie nur morton kaj pereon?

Murdo en Esperantujo. 156 paĝoj, 390 bfr./21,00 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Instruistoj kaj kolektantoj: Ricevu jardek-kolekton de la lerneja revuo *Juna amiko*; tio estas trideko da numeroj, de 1976/2 ĝis 1986/3, ĉio por la prezo de unu jarabono. Ĉe UEA tio kostas 8,40 gld., aŭ pere de landaj perantoj en lokaj valutoj. Indiku klare: "Juna amiko – la jardeko 76-86".

Instruistoj kaj giga-kolektantoj: Ricevu 30 ekzemplerojn de unu malnova numero de *Juna amiko*, ankaŭ por la prezo de unu jarabono. Tiun servon ni proponas al instruistoj, kiuj tiel povos akiri klas-kompleton de la revuo – unu por ĉiu lernanto. Ni tamen ne rifuzos mendojn de giga-kolektantoj kaj aliaj stranguloj. Se vi deziras ricevi difinitan numeron, bv. indiki tion.

MALTRAFA TRAFIKO! La libro anoncita sur p. 294 de *Katalogo 1988/89* sub la titolo *Manlibro pri transporto de fluidaĵoj* de J. Manceau, estas tute erare ordigita sub la rubriko "Trafiko". Fakte, ĝi tute ne temas pri trajnoj aŭ kamionoj, sed pri praktika teknologio de cirkulado de fluidaĵoj en tuboj, kaj la libro rilatas ĉefe al kemia industrio. Cetere, temas pri unu el la plej bonaj fakaj libroj verkitaj en Esperanto. La prezo ĝustas: 21,00 gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Esperanto en radio

● **Estonio:** La horoj indikitaj en la junia tabelo estas fakte la vintraj, kiuj denove validas jam de la fino de septembro: do por oktobro 6, 9, 20, 23; novembro 3, 6, 17, 20; decembro 1, 4, 15, 18.

● **Francio:** La pariza stacio Radio Esperanto, 145 rue Amelot, F-75011 Paris, bonvenigas korespondaĵojn kaj materialon el la tuta mondo. Vd. ankaŭ supre ĉe "Rokmuziko" pri alia franca stacio.

● **Kubo:** Ekde la 7-a de aŭgusto, Radio Havano havas regulan 20-

minutan dimanĉan elsendon en Esperanto – la unua interkontinenta elsendo en la Amerikoj. Al Ameriko: je 17h00 UTC, frekvencoj 11760, 11725 MHz (25m), 15340 MHz (19m); je 22h40 UTC, frekvencoj 11930, 11875, 11795, 11760, 11725 MHz (25m), 15340 MHz (19m), 6060 MHz (49m). Al Azio: je 08h00 UTC, frekvenco 9525 MHz (30m).

Ene de Kubo, Orlando Raola González enkondukis 15- ĝis 20-minutan Esperanto-rubrikon en popularan vesperan programon, "Ondo 2000", de la ĉefa Havana radiostacio. Li petas la sendon de

taŭgaj sonmaterialoj, aparte muziko – eventuale por posta redono post kopiado – al Longa 220, apt. 5, Mantilla, 10900 La Habana, Kubo.

● **Pollando:** Kiel dirite sur p. 99 de la maja numero, Radio Polonia nun havas po kvin elsendojn ĉiutage en Esperanto. La unua (05h-06h UTC) okupas plenan horon, dum la elsendo de 19h30 ĝis 20h00 UTC ne plu okazas. Ĉe la 73-a UK en Roterdamo, ĉefredaktoro Andrzej Pettyn multe profitis de tiu ŝanĝo por aŭdigi detalajn kongresajn raportojn kaj foje tutajn paroladojn, ofte nur kelkajn horojn post la okazo.

PARIZA FRENEZA SEMAJNO

Solenu la 200an datrevenon de la Franca Revolucio, 22-29 julio 1989

“La Parizanoj estas gajaj homoj” L.L.Z. (PIV)

Profitu nian frenezan semajnon kaj kontrolu la aserton de nia majstro!

Malkovru la ĉiaman kaj hodiaŭan Parizon!

Konstatu, ke **daŭre staras** la Eiffel-turo, la Kolono de la Bastilo, la Operdomoj, Katedralo Notre-Dame, la Louvre-Palaco, la Obelisko, la Panteono . . .

Miru pri la uzinaspekta Kulturcentro Pompidou, pri la Piramido ĉe la Kvadrata Korto de l' Louvre, pri la Kolonoj de Buren apud la Reĝa Palaco, pri la Civito de la Sciencoj kaj ties fama Geode (kun ĝia 1000-kvadratmetra ekrano), kie vi retrovos la impresojn de viaj prapragevoj spektante filmon de Lumiere . . . ktp . . .

Sed ne nur monumentoj kaj muzeoj vidindas en Parizo: vi povos **butikumi ŝike** laŭ Elizeaj Kampoj kaj **popole** tra la pulbazo de Saint Ouen.

Ankaŭ **frivole** vi spektos la mirindan revuon de la famkonata kabaredo **LATINA PARADIZO**.

5500 F*

Informilon kaj aliĝilon petu rapide de Unuiĝo Franca por Esperanto (Turisma Servo) 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS

Entenatas:

- luksa hotelo por sep noktoj,
- matenmanĝoj kaj ok luksaj manĝoj laŭ franca kulturo,
- aro da vizitoj al muzeoj, luksaj spektakloj, panoramoj, unikaj neofte vizitataj kvartaloj,
- esperantistaj ĉiĉeronoj kaj . . . transportoj.

* 6400 F por unupersona ĉambro

Fokuso

Kvaronjara popularscienca magazino

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

“Stafeto”-serio prezentas:

Kazinski venas tro malfrue

Deck Dorval

Kial stabilanima kaj persistema viro, sukcesa inĝeniero farus murdon? Kaj, se li decidas fari ĝin, ĉu li estos sufiĉe inĝenia, ĉu li ekzakte kalkulos siajn ŝancojn, elektos la rimedojn kaj zorge kaŝos la spurojn por fari senmankan murdon, kaj tiel trompos la famkonatan inspektoron Ksavero Kant?

Kazinski venas tro malfrue 176 p., 445 bfr/23,40 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.



COVALEX S.A.

Chemin des Voirambeys
Chalet “Les Cascades”
CH-3974 MOLLENS
Svislando

Serĉas importi rekte el fabrikanta lando:

malmultekostajn ● 3 ½" kaj 5 ¼" DS/DD disketojn “IBM-kongruajn”

- “IBM-kongruajn” komputorojn, porteblajn, kun likva-kristala ekrano, 1 aŭ 2 disketlegiloj, ĉiuj naciaj klavaroj, por lernejoj.

Serĉas eksporti kaj traduki en ĉiuj landoj kaj lingvoj:

la propran komputorprogramon pri tajplernado serioze faritan de gefakuloj.

Por ĝia agado “mara agentejo”:

serĉas ĉiam, tutmonde kaj ĉiutage ŝip(et/eg)ojn por aĉeti/vendi, lui/luigi okaze de libertempo, laboro ktp... eble ni jam konas la aĉetiston aŭ la vendiston de la ŝipo kiun vi posedas aŭ pri kiu vi revas... kaj plue ni organizas, en Sud-Francio aŭ en la princejo Monako, ĉion pri maraj aferoj: surŝipajn kunvenojn, luigadojn/luadojn surmare aŭ enhavene, subakviĝadon, doganajn kaj flagajn formalajojn.

NI KLOPODAS KOMERCI ESPERANTE, NE HEZITU KONTAKTI NIN SKRIBE EN SVISLANDO.

Ni vologas energie labori internacie kaj pro tio, ni havas bankkontojn en Benelukso, Monako, Svislando kaj plue unu komercan kompanion “Jersey (C.I.) Limited Liability Cy (1861-1968)” por solvi la transitajn aferojn.